8-a JARO, N-o 392



LEIPZIG, 28. / 7. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

PRI LA ORGANIZA PROBLEMO.

Respondo al publika letero de K-dino Klatil.

Stokholmo, la 2-an de julio 1932.

Kara K-dino Klatil!

Leginte vian leteron en „S-ulo“, mi iom hontis, ĉar nun fakte vi, kiu ja apartenas al la socialdemokrata partio, do estas sampartianino de mi, intencas fari la samajn stultaĵojn, kiajn faris la kom. opoziciuloj. La publikaj leteroj de K-do Lanti, kiujn mi ĉiam legas kun granda intereso, estas laŭ mia opinio tre instrupovaj ankaŭ por socialdemokratoj, kiuj ne jam blindiĝis pro partia fanatiko. Mi tute ne deziras, ke vi havu en ĉio la saman opinion kiel K-do Lanti aŭ eĉ kiel mi; sur la diverso de la opinioj ja baziĝas la progreso de la organizoj, sed en gravaj punktoj, kiuj koncernas la strukturon de iu ajn organizo, la anoj nepre devas resti sen antaŭjuĝo k ne kondamni tiujn, kiuj penas trovi aliajn, pli modernajn, pli modestajn organizstrukturojn ol tiujn antikvajn, kiel estas la „internacio“. Ŝajnas al mi, ke vi legas „S-ulo-“n nur per partia okulvitro k speciale la leterojn de K-do Lanti kun granda antaŭjuĝo, ja eĉ kun nekonfido k pro tio vi ne komprenas, kion K-do Lanti skribas. Se vi vere intencis refuti la „nelogikaĵojn“ de K-do Lanti per via letero, tiam mi konsilas al vi, ankoraŭfoje legi ĉion k vi mem povos konstati, ke vi tute malsukcesis.

Mi persone ĉiam ŝatas tute klaran esprimon de la opinio, intrigojn mi ege malamas. Do, ankaŭ en nia afero ni parolu tute klare; vi neniam ĝuste komprenis la sennaciecan ideon, vi neniam estis vera SAT-anino, vi deziras havi „esperanto-internacion“, ĉar tiu antikva, senanima organiz-strukturo estas pli bone komprenata de vi. Sed samklare mi diras al vi: „Manojn for de la strukturo de SAT!“ Mi diras tion al vi en la nomo de la plej multaj SAT-anoj en Germanio k Svedio. Eĉ multaj Gek-doj, kiuj momente ne povas pagi la kotizon al nia mondasocio, tamen ne deziras vian „internacion“, ili estas tamen sennaciuloj. Speciale nun dum mia vojaĝo tra Svedio mi konstatas la grandiozan sennaciecan ideon, ni estas anoj de unu sola lando „Esperantio“; en tiu lando regas nur unu sola lingvo esperanto k laŭ mia opinio samlandanoj ne bezonas kuniĝi internacie.

Ŝajnas al mi, ke vi estas iom influita de la agoj de la germanaj kom. esperantistoj, kiuj ja nun intencas fondi kom. esperanto-internacion. Nu, ĉu vi opinias, ke la sole rrrevoluciaj komunistoj, tiuj, kiuj antaŭ dek unu jaroj kun entuziasmo helpis fondi SAT, nun fondas la „Internacion“ por plifortigi la proletan esp-an movadon? Ne, K-dino Kl., ili nur agas tiel, por plifortigi la kom. partion, al kiu oni volas doni plian apogilon; pro tio oni fondis siatempe I.F.A. k pro tio oni nun fondos la kom. esperanto-internacion. Nia partio estas sufiĉe forta, ni ne bezonas apogi ĝin per esperanto-internacio, do ni agu per esperanto ne por la partio, sed por la socialismo ĝenerale. Karl Marks ja ne diris: „Sampartianoj tutmondaj unuiĝu, sed: proletaro tutmonda unuigu vin!“

Tute nova por mi estas, ke en Aŭstrio oni nur bezonas pagi unu kotizon al laborista kuturkartelo por esti membro en ĉiuj laboristaj ligoj. Diru al mi bonvole, kiom alta la kotizo al tiu kartelo estas, k ĉu A.L.L.E. apartenas al tiu kartelo. Laŭ mia scio en Germanio tia ideala kartelo ne ekzistas. Jes, kulturkartelojn ni havas, sed en ili oni ne akceptas niajn esp-ajn grupojn, ĉar nia movado ja ne estas kulturafero laŭ ilia opinio. En tiuj karteloj ni tute ne havas unuecigitan kotizon tiel, ke la ano de la kartelo estu samtempe ano de ĉiuj laboristaj ligoj. K-do Lanti tute pravas: la lab. sportulo en Germanio ne nur pagas du kotizojn, sed ofte eĉ tri aŭ kvar. Se ekzemple laboristo ŝatas bicikli, li apartenas al la ligo por biciklantoj. Se la sama laboristo ankaŭ ŝatas gimnastiki, li devas pagi duan kotizon al la ligo por gimnastikantoj k sportuloj. Sed ofte okazas, ke la laboristo samtempe ŝatas kanti, do li pagos trian kotizon al la ligo por kantemuloj. Do, oni pagas multajn kotizojn por sama afero: „sporto“. Sed ekzistas ankoraŭ pli da tiaj laboristaj sportasocioj. Per tiu argumento mi tute ne intencas laŭdi la „du kotizojn“ en la lab. esp-a-movado, sed mi pruvas per tio, ke ankaŭ aliaj lab. organizoj ne jam trovis alian vojon por simpligi la kotizan aferon k oni ne rajtas protesti kontraŭ la du kotizojn en nia movado. La plej ideala solvo laŭ mia opinio estus se en ĉiuj landoj la lab. sport- k kulturunuiĝoj kuniĝus al unu lab. kulturligo, kiu havus diversajn fakojn por la unuopaj sport- k kulturspecoj. Pagante la kotizon al tiu ligo, la membro devus havi la rajton partopreni tiujn fakojn laŭ deziro. Se tiu lab. kulturligo ankaŭ havus fakon por esperanto, *tiam la laŭlandaj LEA-oj estus superfluaj k ni nur bezonas pagi unu kotizon al nia mondasocio* k povus agi pli bone „per“ esperanto. Do, kara K-dino Kl., uzu viajn fortojn en tiu direkto, helpu, ke la LEA-oj *fariĝu nenecesaj* k penu kompreni la sennaciecan ideon, tiam vi agos ĝuste por la „laborista esperantismo“.

Nun pri la delegitsistemo. Estas sufiĉe konata fakto, ke en ĉiuj organizoj oni delegas ĉefe tiujn anojn, kiuj bone komprenas paroli publike. Sed dum kongresoj oni ja ne nur parolas, sed oni ankaŭ voĉdonas k elektas, do ankaŭ neparolkapabla K-do havas la

eblon esprimi sian opinion per voĉdonilo. Tiuj, kiuj komprenas bone paroli, ofte ankaŭ komprenas bone trompi k ofte okazas, ke silentemuloj, kiuj delegis la delegiton, poste konstatas, ke ili estas trompitaj. La forto de SAT fakte estas, ke ĉiu rajtas aktive partopreni la kongresojn. Se ni havus la delegitsistemon, tiam verŝajne SAT estus hodiaŭ en la manoj de fanatikaj partianoj. Laŭ mia opinio ĉefe la silentemuloj savis SAT-on en Amsterdamo. Partopreni kongreson kiel gasto estas por multaj tre enuiga. Aŭskulti diskutojn sen havi rajton mem diskuti estas puno por aktiva esperantisto.

Via opinio, ke SAT-kongresoj nur estas „babilejoj", estas vere stranga. Bonvolu diri al mi, kiaj ejoj estas la internaciaj kongresoj de aliaj organizoj, dum kiuj oni parolas en 6–7 lingvoj. Mi mem partoprenis jam kelkajn SAT-kongresojn k aŭdis tie bonajn paroladojn eĉ de sufiĉe famaj lab. gvidantoj. Ĉu ili laŭ via opinio estas „babiluloj"? Ĝuste per la delegitsistemo vi faros babilejojn el niaj kongresoj, ĉar tre ofte la parolkapablaj delegitoj aŭdas plej volonte paroli sin mem k pro tio ili ofte babilaĉas, ripetante, kion oni jam dekfoje aŭdis.

Multon oni povus skribi pri via respondo al K-do Lanti, sed mi opinias, ke estas pli bone paroli buŝe pri ĉio en Ŝtutgart. Mia intenco, eĉ mia devo nur estas diri al vi jam nun, ke la laboristaj esperantistoj ne bezonas k ne deziras internacion, ni deziras esti sennaciece organizataj; tiun opinion ankaŭ havas la SAT-anoj en Svedio. Ni penu inter ni forigi la antikvan opinion pri organiz-strukturoj k serĉu novajn vojojn, kiuj pli intime interligas la tutmondan proletaron. Preskaŭ ĉiujn viajn dezirojn oni povas efektivigi en la sennacieca kadro de nia mondasocio, oni nur plenumu la kondiĉojn de la konvencio de Gotenburgo.

Sennaciece vin salutas

Ludoviko Puf (320).

*

Pri la respondo al publ. letero XI.

Kiam mi estis leginta la respondon de K-dino Klatilino al la „XIa publ. letero" de Lanti, venis al mi la inklino, modeste ankaŭ aŭdigi mian voĉon. Sed tiu voĉo ne estos eĥo de tio, kion skribis K-dino Kl.

„Al la diablo kun tiu malbenita supertendenceco" ... K-dino Kl. skribis. Kaj ŝi kompreneble celis al SAT. Sed ĉu la LEA-oj ne estas ankaŭ supertendencaj? Mi estas prezidanto de sekcio k mi ĉiam gvidis tute supertendence. Ĉu tiele K-dino Kl. ne agas en sia LEA-grupo? Mi bedaŭras, sed tiam mi devas konfesi, ke mi ne alte taksas ŝin kiel LEA-aninon, ĉar estas nia devo en la esperanta movado esti superpartieca. Nur tiel agante, ni povas esti utilaj por la disvastigo de nia lingvo. Kaj plue, kiun tendencon ŝi ŝatas? Bedaŭrinde ŝi ne skribis pri tio. Kial ne? Tamen mi volas diri al ŝi, ke mi ĝojas, ke mi havas okazon legi gazeton, kiu estas vere superpartieca. Mi de tempo al tempo sentas naŭzon pri la *tendencaj* gazetoj.

Kial mi ne kredos, kion ekz. komunisto skribas pri la okazintaĵoj en sia lando? (Mi estas O.S.P.[1]-ano). Ĉu K-dino Kl. estas certa, ke ĉiuj legantoj kredas, kion oni skribas en ilia partigazeto? Mi tute ne.

Nia tendenco en la esp-a movado estas: esp-o al ĉiu klaskonscia proleto por unuigi tiujn proletojn. Kaj tio estas nobla laboro k nur partifanatikuloj ne komprenas tion. Mi taksas la artikolojn en „S-ulo" pli alte ol la plimulton el la artikoloj, aperantaj en la partigazetaro, kiu grandparte estas uzata por insulti aliajn lab. partiojn.

Pri la dukotiza afero jenon: En mia sekcio la senlaboruloj pagas semajne 5 cendojn. Ili certe ne povas pagi pli. Ĉu K-dino Kl. opinias, ke ili per tiu kotizo povas fariĝi samtempe aktivaj SAT-anoj kiel ajn? Se ni, post la fino de la kursoj, devas varbi la eks-kursanojn al la federacio, ni ne havus multan sukceson, se la kotizo estus duobligita. Krom tio la amo de la komencantoj al esperanto ne estas tiel granda, ke ili ŝatas pagi tiom altan kotizon, grandparte por gazeto, kiu, rilate ilin, ne estas legebla.

Mi ne favoras al delegitsistemo rilate esp.-kongresojn. La lingvo mem estas nia ĉefa celo k tial, kiel eble plej multe da personoj parolu. Ankaŭ la kongreso en Berlino estos, malgraŭ la delegitsistemo, babilejo. Laŭ mi, la plej granda gravo de niaj kongresoj estas la fakto, ke gelaboristoj el tuta mondo kunvenas por „babili" per esperanto, por tiele konvinki la indiferentan amason pri la praktika taŭgeco k utilo de esperanto.

Ni lasu SAT, kiel ĝi estas.

Bas Wels (17 668).

*

Kelkajn tagojn post la apero de la „letero" de K-dino Kl. alvenis la du ĉi-supraj respondoj. Ni decidis publikigi ilin entute. Sed poste alvenis ankoraŭ aliaj tre ampleksaj, kiujn ni povas nur parte enmeti. Ni vicigas ilin laŭ la dato de ricevo.

Skribis K-do *Dubaptito* (61): „... Mi loĝas en lando, kiu ĝuas certan reputacion pro sia organiza sistemeco. Tamen mi pagas ekz. en mia sindikato plurajn kotizojn. Se ĉiujn apartajn kotizojn ni pagus al sama instanco, ili tial tamen ne malaltiĝus, almenaŭ ne rimarkeble. Do, via argumento koncerne al Aŭstrio ne trafas, kion vi volas. Klopodoj unuigi la kotizojn, ankaŭ jam en nia regiono estas faritaj, sed sensukcese, ĉar eĉ tio komplikigus la administradon. ... Pri la delegitsistemo, mi emas demandi: ĉu vi jam kolektis spertojn pri „la kaŭzoj de misharmonio en lab. organizoj"? Ĉu per tia delegitsistemo (elekto) oni trafas ĉiam la „plej taŭgajn" reprezentantojn? Mi povus rakonti multon pri malagrablaĵoj, intrigoj k konfliktoj kaŭze de tiaj delegitelektoj. Kaj ĉu praktike estas eble, ke delegito absolute povas „defendi antaŭ internacia forumo la opinion de la plimulto en la asocio"? Jam sufiĉe longe mi estas en la lab. movado por povi sperti, kiel „delegitoj" „defendis" la opinion de la „plimulto". Ĉe kongresoj tre ofte per diskutado iuj aferoj montras bildon alian ol vidis la „plimulto" ĉe elekto de la delegito. Kiu volas, ke niaj SAT-kongresoj ne regresu, tiu ne helpu forigi la rajton por ĉiu aktiva membro, *aktive* ankaŭ partopreni niajn kongresojn, por kiuj ofereme tempon k monon li (aŭ ŝi) dediĉas. Aŭ ĉu ne estas diferenco por kongresano, ĉu li ankaŭ povas diri sian opinion oficiale, aŭ ĉu li nur estas allasata kiel *gasto* aŭskultanta? ...

... Ĉu SAT nepre sektiĝu? Ekzistas plej-diverstendencanoj, eĉ kompartianoj, kiuj estas k volas resti SAT-anoj pro ĝia *unika* organizformo. Laŭ mia konvinko la likvido de nuna organizformo identiĝus kun radikala detruo al SAT. Kiu volas unutendencan (partian) Internacion, tiu ne rajtas financi ĝin per helpo de alitendencanoj. Ni rifuzis kompartian enmikson en SAT. Tial tiuj iniciatintoj nun preparas Internacion. Ĉu nepre oni imitu la partian ekzemplon kreante ankaŭ *kelkajn* esp-ajn Internaciojn? ...

... La tutmonda krizo pruvas, ke io ne ĝustas. Ĉu la SAT-strukturo kulpas? Ne, anstataŭ reformi nian organizformon, ni klopodu reformi la cerbojn k organizojn de tiuj, kies pensado k agado pro lingvomanko estas ligitaj k influitaj *naciece*. ..."

De K-do 16 900 „... Ĉu SAT fariĝu nura gvidorganizo de la laŭŝtate disigitaj LEA, laŭ la modelo de la II-a aŭ de la Sindikata Internacio? La sperto ne kuraĝigas iri tian vojon. Ĉar tiuj Internacioj ĝis nun neniam sukcesis instigi siajn organizojn al internacia kunbatalo. ... Ankaŭ en la esp. movado ni devas timi, ke la unuopaj organizoj malatentas la komunan celon pro siaj apartaj interesoj, speciale se ili estas sub partia influo. ... La laŭlanda disiĝo de la LEA-aparatoj malakcelas intiman kunligon. Ekz. diskutado pri esp. aferoj okazas unue en nacia kadro k nur la rezulto, ofte influata de naciaj konsideroj aŭ antaŭjuĝoj — kiuj ankaŭ en la lab. movado ankoraŭ svarmas — estas aplikata en la internacia diskutado; interkonsento

[1] Sendependa socialista partio nederlanda. — *Red.*

tiele estas pli malfacila, sed diferencoj ekestas pli facile ol en sennacieca diskutado. En sennacieca asocio ja la dislokiĝo de la gvid-aparato devigas la Gek-dojn nepre uzi esp-on k rigardi trans la ŝtatajn limojn k tiel montras al ili konstante, ke ilia patrio estas ilia klaso, ke ne estas grava ilia ofte nur hazarda nacieco. Jam psikologie la interrilato inter la Gek-doj estas plifaciligata, per la scio, ke la alia K-do estas sam-asociano k ne nur ano de asocio amikece interrilatanta kun la propra asocio. ...

... La delegitsistemo havigu al ni „veran" demokratecon. Nu, kiu ne fermas la okulojn, tiu certe konsentas la asertojn de K-do Lanti, ke en tiu sistemo estas decida ĉefe la oratora kapablo, sed ne aliaj respektindaj ecoj. Kiu do el ni ne jam spertis en niaj grandaj „demokrataj" organizoj, ke la volo de l' simplaj membroj estis malatentita aŭ ke ĝi per lerta parolado aŭ influado pere de gazetoj estis ŝovita en direkton tute kontraŭan al ilia unua intenco? ...

K-dino Kl. plendas, ke en SAT-kongresoj povas esprimi sian opinion nur esp-istoj scipovantaj esp-on. Eble ŝi opinias tion ne sufiĉe demokrateca. Sed pro tio nomi tiujn kongresojn babilejoj estas maltrafa. Estus ja vere ridinda esp. kongreso, dum kiu povus regi la kutima lingva konfuzo. Ĉu la eblo paroli en LEA nacilingve, estas avantaĝo? Tute ne. Homo, kiu scias, ke li rajtas paroli ankaŭ nacilingve, ĝenerale ne tiom intense klopodas lerni esp-on kiel homo, kiu scias, ke li nepre devas scipovi ĝin. Por scipovi esp-on ja ne necesas esti lingva geniulo; ĉefe sufiĉas diligento. Sed scipovi esp-on, estas ja la minimuma postulo, kiun devas fari esp. asocioj al siaj membroj, kiuj pretendas kundecidi pri esp. aferoj. ... Kiel en la sportmovado sportulo devas pruvi, ke li kapablas fari la ekzercojn postulatajn por la koncerna grado, tiel esp-isto devus pruvi per mallonga ekzameno, ke li kapablas ekz. traduki simplan esp. tekston k skribi leteron. Tiele ankaŭ la komencantoj estus instigataj ege klopodi pri esp-o. ...

„Tiu malbenita supertendenceco!" ... La tasko de SAT ne estas efektivigo de ia partia aŭ politika celo, sed disvastigo de esp-o. Tiu tasko malhelpas neniun, esti fidela k fervora partiano. Sed tiu tasko ankaŭ ne prosperas pli bone pro dependeco de iu partio: la spertoj en la sindikatoj k en la liberpensula movado eĉ pruvas la malon. Por bone plenumi siajn taskojn SAT devas esti sendependa de iaj ajn partiaj konsideroj. Vi diras, ke tio ne estas ebla. La partifanatiko reganta nun la lab. movadon preskaŭ ŝajnigas vin prava. Kompreneble ĉiu homo estas influata de la teorioj, kies ano li estas. Ĉu pro tio ne estas eble serioze ekzameni la faktojn k pripensi la aferojn sendogmece? Ambaŭ procedoj hodiaŭ ja ne estas tre ŝatataj k malmulte aplikataj. Sed tio ne povas esti motivo por ne celi tian spiritan progreson. La statuto de SAT eĉ postulas tion kiel kulturan taskon. Sed realigebla ĝi estas nur, se ĉiuj Gek-doj klopodas pri ĝi.

Tre malfacila tasko. Ĉiu n-o de „S-ulo" tion pruvas. Kaj ne nur al K-dino Kl. la enhavo ofte ne plaĉas; mi kredas, ke eĉ K-do Lanti apartenas ofte al tiaj malkontentuloj. Sed kiel ni povas ŝanĝi tion? Certe ne farante el „S-ulo" parti-gazeton. Pro tia malkontento mi jam antaŭ kelkaj monatoj skizis proponon pri regula raportado k raportistaro. Sed mi baldaŭ konvinkiĝis, ke tia propono ankoraŭ ne estas realigebla pro manko de kapablaj (k sendogmemaj) Gek-doj. ... Eduki tiajn Gek-dojn al racia kritika pensado estas tre malfacila tasko. Sed fari el „S-ulo" partiece gvidatan revuon tute malebligas tian edukadon, forpelas la alipensantojn k detruas la tutan lab. esp. movadon."

De K-do A. Berdan (16 986, Wien): „Estimata K-do Lanti! ... Vi skribis interalie: ‚Se por nura pago de malalta kotizo al la landa asocio la *Jarlibro, S-ulo, La N. E.* povas esti liverataj al la 10 000 esp-istoj, pri kiuj vi parolas, mi eble rezignus pri la sennacieca strukturo de SAT'. Tio signifas, ke laŭ via propra konfeso SAT povus sendanĝere pluvivi ankaŭ *sen* la sennacieca doktrino, kiu nur malhelpis ĝis hodiaŭ konstrui veran internacian organizon de la lab. esp-istoj k malhelpis fortan, mondskalan propagandon de esp-o inter la lab. organizoj. Tion konstati estas tre grava. Ni do konfesu, K-do, ke la sennaciismo estas ankoraŭ io nebula, kvankam bona ideo. ... Konstatinte nun, ke SAT povas vivi sen la ĝisnuna gvidmotivo de sennaciismo, tiam restas nur la demando: ĉu gvidi SAT-on internaciskale, ĝin apogante sur iu partia Internacio? Jes, K-do Lanti, tion postulas niaj plej proksimaj celoj, se ni volas progresigi la esp. movadon laboristan. SAT ja skismiĝis en du partojn. La plimulto el la komunistoj ja forlasis SAT-on k formis sian apartan internacian esp. organizon. Kio restis en SAT, ŝajnas esti plej multe socialistoj. Kaj pro tio ni devas klare vidi la vojon. Estas ja absolute ne vere, ke regas en SAT tielnomata supertendenceco. Ĉiu, kiu kredas pri supertendenceco, trompas sin mem. En ĉiuj organizoj supertendencaj regas la interna lukto de la opinioj, formiĝas frakcioj, k malhelpas pro tio fruktodonan k progresigan laboron. Ne k nenie ekzistas vera supertendenceco. ... Ni devas la nunan strukturon de SAT aliigi k fari el ĝi internacian organizon de la socialistaj esp-istoj. Kaj post tia pura distingiĝo ĉiuj membroj *kun ĝojo k amo* kunlaborados al la organizo k varbos por ĝia disvolviĝo. ...

... La nombro de la delegitoj ĉe la internaciaj kongresoj estu provizore maksimume 100. Ĝi estu dividita laŭ la nuna membrostato de LEA-oj (proks. 10 000). Oni devus ellabori tian skalon kune kun la LEA-oj. Krom la oficialaj kongrestraktadoj, al kiuj rajtas partopreni nur la oficialaj landaj delegitoj, oni aranĝu okaze de ĉiu kongreso internacian renkontiĝon por ĉiuj anoj, por reciproke kontaktigi la membrojn k doni ankaŭ al ili la eblon internacie praktiki esp-on. ... Vi certe pravas, dirante, ke estus granda danĝero en la nuna stato, se iuj gravaj organizoj alprenus esp-on, ĉar mankas la lingvokapablaj instruontoj. Tiun staton forigi estus unu el la klerigaj celoj de SAT. Ĝi povus eble instali internaciajn lernejojn (kursoj) 3 – 6 monatojn daŭrantajn por eduki sufiĉe lertajn esp-istojn kiel instruontojn k. s. Dungi por la gvidado de tiaj kursoj nur eminentajn esp-istojn kiel instruontojn. Prepari tiajn kursojn k kompletigi ilin per la organo, per konstanta rubriko: lingvaj aferoj ktp. Sed en sia nuna strukturo SAT neniam povas entrepreni tiaspecajn aranĝojn, ĉar mankas la financa bazo por tio. *Nur la kunigo de ĉiuj LEA* – kiel proponis K-dino Kl. – *al unu fortega, impona internacia organizo povas ebligi tion.* ...

... Vi ja mem diris foje, ke ni devas esti (en SAT) unue esp-istoj k nur poste partianoj, ktp. Estu ankaŭ vi unuavice esp-isto, kiu estas devigata profiti ĉiujn okazojn por antaŭenpuŝi la lab. esp. movadon, k rezignu je via ideo pri sennaciismo k forĵetu la kredon pri supertendenceco. ... Ne timu pro la socialistiĝo de SAT. Kredeble kelka nombro da K-doj forlasos SAT-on, sed miloj da novaj membroj aliĝos per la LEA-oj. Mi ĝis nun ĉiam parolis pri SAT, sed nova internacia organizo certe ankaŭ portos novan nomon. ..."

De K-do 55: „... Ĝis nun mi ja ne rimarkis, ke K-do Lanti skribis nelogikaĵojn k kontraŭdirojn. Tio ne signifas, ke mi blinde aprobas ĉiujn liajn ideojn, sed mi konfesas, ke ĉiam plezure mi legas liajn artikolojn.

Rilate la kongrespartoprenon, la nuna sistemo tre plaĉas al mi; ĝi estas tiom pli demokrateca, ke kelkajn monatojn (aŭ semajnojn) antaŭ la kongresdato, iu ajn ano povas, pere de la gazeto, konigi proprajn proponojn. Tiel la tuta SAT-anaro estas informita k povas pripensi tiujn proponojn. Plie, la kongreso ne estas decida: ĝi estas nur propona. Pri la gravaj demandoj findecidas la tuta SAT-anaro. Tio estas vere demokrateca.. ... Klatilino skribis: *„Al la diablo jam foje kun tiu malbenita supertendenceco, kiu en vero tute ne ekzistas.* „Mi povus skribi: *„Al*

la diablo jam foje kun tiu malbenita tendenceco, kiu en vero malebligas la proletunuiĝon!“ Ĉiuflanke, ĉiel k ĉiam oni alvokas al unuiĝo, sed samtempe oni malbenas la supertendencecon! Ni ne sufiĉe atentas, ke la proletoj povos vere unuiĝi nur, kiam ili estos sufiĉe bonedukitaj por esti supertendencaj. Kiam K. Marks predikis al ĉiulandaj proletoj, ke ili unuiĝu, li tiam sin turnis al ĉiuj proletoj senescepte — tute ne atentante la tendencojn. Sufiĉas do, laŭ mia opinio, por esti bona SAT-ano, esti klasbatalanto k tolerema por ĉiuj aliaj klasbatalantoj. Ĝis nun SAT laŭiris tiun vojon: ĝi ne deflankiĝu!

Kl. plendas. ke „S-ulo“ ne estas gazeto kleriga. Estas memkompreneble, ke „S-ulo“ ne estas perfekta. Nia gazeto sendube pliboniĝos, plivaloriĝos dank' al presado de edukaj k klerigaj artikoloj, kiujn certe verkos K-dino Kl. Tiel estu.“ [1]

Kiel la legantoj povas konstati, la deziro de K-dino Kl., ke ŝia letero trovu eĥon ĉe la SAT-anaro, estas plenumata. Kaj ni devas danki al ŝi k al K-do Berdan, ke ili tute klare konigis sian opinion k ne provas atingi sian celon per malrekta vojo. En Ŝtutgart devos ja esti farata klara respondo al jena demando: ĉu SAT el sennacieca ĉiutendenca organizo aliĝu en unutendencan (socialistan) internacion?

Tute ne utilus miaflanke provi konvinki K-dinon Kl. k K-don B. Mi relegis la „publikajn leterojn“, kiujn mi skribis k akiris la konvinkon, ke tiuj du Gek-doj aŭ tute ne legis, kion mi skribis, aŭ ne povas kompreni min, aŭ eble simple ne volas. Ekz. K-do B. konfuzas la sennaciecon de SAT kun la sennaciismo, malgraŭ miaj tiutemaj klarigoj.[2] *Preskaŭ pri ĉiu punkto estas la sama intenca aŭ senkonscia miskompreno. Mi do tute rezignas esti ĝuste komprenata de kelkaj K-doj. ...*

Por tiuj, kiuj povas k deziras kompreni, mi simple aldonu, ke la Ge-SAT-anoj devas decidi pri la demando, ne atentante mian personon: estas vere, ke nenial mi konsentus okupi respondecan postenon en iu ajn esp. internacio; mi ja opinias, ke tia organizformo por mondlingvanoj estas necelkonforma k iel similas arĥaikan plurarkan ŝtonan ponton, kompare kun unuarka ferbetona ponto; mia nuna plej forta deziro estas tute forlasi gvidpostenon en nia movado, eĉ se la plimulto el la K-doj decidos konservi la sennaciecan strukturon de SAT.

E. L.

[1] Krom tiuj respondoj, destinitaj por la gazeto, alvenis ankaŭ kelkaj leteroj, kiuj ĉiuj protestas kontraŭ la provo aliigi la strukturon de nia Asocio.

[2] Komp. la „publikan leteron“ IIa en la n-o 380.

RAPORTARO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

por la periodo de 1. VII. 1931 ĝis 30. VI. 1932.

B) RAPORTO DE LA ADMINISTRACIO.

Situacio de la membraro k abonantaro al Sennaciulo laŭ la stato de 30. junio 1932:

Lando	Aktivaj	Aspir. Subten.	Abon.
Afriko	2	—	2
Alĝerio	6	—	7
Argentinio	8	2	8
Aŭstralio	1	—	2
Aŭstrio	108	10	130
Belgio	49	4	64
Brazilio	3	—	2
Britio	89	16	101
Bulgario	3	—	5
Ĉeĥoslovakio	62	16	72
Ĉinio	3	—	2
Dancigo	1	2	1
Danio	4	—	7
Estonio	9	—	12
Finlando	9	4	8
Francio	157	33	209
Germanio	471	130	510
Hindio	—	—	1
Hindo-Ĉinio	1	—	1
Hispanio	40	24	44
Hungario	6	—	12
Islando	1	—	1
Japanio	5	1	12
Jugoslavio	5	—	5
Kanado	4	—	4
Latvio	5	3	5
Litovio	5	—	7
Madagaskaro	—	—	1
Nederlando	234	36	249
Norvegio	13	6	15
Nov-Zelando	—	1	—
Polio	21	1	39
Portugalio	37	3	19
Rumanio	1	—	4
Saarlando	2	—	2
Sovetio	19	1	18
Svedio	187	26	193
Svisio	19	1	15
Turkio	1	—	1
Usono	29	—	37
Sume:	1620	320	1827

Sekve rekotizis aŭ novaliĝis ĝis la 30. junio 1932 sume 1940 gemembroj. Certe ĝis la fino de la jaro nia membraro ankoraŭ plimultiĝos, malgraŭ la ekonomia mizero nun reganta en la mondo. Kompreneble la laste eldonita jarlibro ne povis montri la ĝustan staton de la membraro, ĉar la adresaro ja ankaŭ enhavis membroadresojn el la jaro 1931; pro tio la hodiaŭa statistiko de la membraro k abonantaro estas aktuala por nia movado.

Pri la malkresko de abonantaro k membraro jam sufiĉe estas parolite. Fakto restas, ke la skismo en la laborista esperanto-movado estas krimo. Ĝi profitigas nur al la indiferento. Anstataŭ labori por la koncentrigo de la fortoj en la lab. esp. movado oni laboris k laboras por la malkoncentrigo. Ni ne lasu trompi nin per iuj sukcesetoj aŭ ŝajnsukcesoj. La esp. movado ĝenerale estas ankoraŭ en la infanŝuoj k pro tio koncentriĝo de ĝiaj fortoj estas speciale nuntempe pli necesa ol iam antaŭe. Ĉia ago favoranta malkoncentrigon de la fortoj en la lab. esp. movado estas, de sana vidpunkto, kondamninda.

Post apero de la Jarlibro iuj K-doj miris, ke ĝi ankaŭ enhavis adresojn de K-doj, kiuj ne pagis la kotizon por la jaro 1932. Nu, en la Jarlibro, paĝo 39, alineo 3 ni tute klare skribis, kiujn adresojn entenas la libro. En la Adm. ni sufiĉe profunde traktis ĉi tiun temon, ĉu presi ankaŭ la adresojn de la membroj el la jaro 1931 aŭ ne? Unuanime ni reprezentis la vidpunkton, ke ni devas presi ĉiujn adresojn de la membroj el la jaro 1931, kiuj ne eksiĝis aŭ ne estas eksigitaj k same sendi al tiuj ĉi membroj la jarlibron. Ni konsideris tion kiel justan agon al niaj membroj el la jaro 1931, kiuj plej grandparte ne povis renovigi ĝustatempe aŭ tute ne la kotizon por la jaro 1932. Por ni validis ilia kompleta pago por la jaro 1931 k ĉar ni ŝuldis al ili la jarlibron por la jaro 1931, ni simple sendis tiun de la jaro 1932. Kaj ni devas konstati, ke eĉ ne unu malakceptis k resendis ĝin.

En jenaj urboj ni havas pli ol 20 membrojn k estas interese kun tio kompari la nombrojn de la antaŭa jaro: Amsterdam 116, Bruselo 33, Dortmund 21, Dresden 33, Leipzig 61, Lisboa 27, Paris 28, Plzen 21, Stokholm 44, Wien 29. Ekzistas ankoraŭ multaj aliaj grandaj urboj, sed mankas al SAT la membroj k verŝajne ankaŭ al la aliaj esp. organizoj.

Pri **Sennaciulo** validas la ĵus dirito. Skismo k mizero inter la laboristaro efikis ankaŭ al la nombro de niaj abonantoj. Gravan baron en la evoluo de nia movado prezentas la malfacilaj monrilatoj inter la plej diversaj landoj. Pri trafo de ekzempleroj en la manojn de sovetianoj ne ekzistas garantio.

Al **La Nova Epoko** ni havas sume 78 apartajn abonantojn aŭ aĉetantojn. Tiu ĉi kvanto da abonantoj estas vere plorinda. Certe inter la abonantoj al „S-ulo“ estas konsiderinda parto, kiu aparte abonus „LNE“, sed tamen ne tiom, ke la „LNE“ povus mem ekzisti. La abonprezo de tiu ĉi revuo estas sufiĉe malalta k oni vere miras pri tiel malgranda abonantaro, kvankam inter la aspirantaj membroj estus konsiderinda parto, kiu povus aboni tiun ĉi revuon.

La eldonkvanto de **La Lernanto** estas sume 4700 ekz. 2200 ekz. trovas lokon en „S-ulo", 1500 ekz. aĉetas „Sveda Laborista Esperanto-Asocio", 200 ekz. „FEO" k 320 ekz. ni sendas al abonantoj k aĉetantoj. Ni ne dubas, ke se la instruantoj klopodus uzi „La Lernanto"n en la kurso kiel legilon, tiam ni certe povus altigi la eldonkvanton. La prezo por 25 ekz. de la sama n-o estas ja nur 1.50 mk.g.

Statistiko pri la librofako de Eldonkooperativo de SAT 1931/32

Titolo	Provizo 1. 7. 32	Provizo 1. 7. 31	Malpliiĝo (vendo aŭ perdo) 1931/32	Malpliiĝo (vendo) 1930/31
ABC de Sennaciismo	833	910	97	207
Diablidoj	892	1019	127	87
Dokumentoj de Kom.	53	94	41	125
Eklumo en la Abismo	69	161	92	44
El la Mondbildo	545	599	54	25
En Kat. de Maljusteco	574	666	92	71
Etiko	568	701	133	93
Fabeloj de H.z.Mühlen	1793	2061	268	203
For la Neŭtralismon!	1812	1962	150	353
* Ĥodinka	233	1347	1114	137
Ili	405	436	31	189
Je la Nomo de l'Vivo	66	118	52	148
Kandid	624	797	173	721
Karl Marks, lia vivo	–	–	–	231
Kristan. k Patriot.	1627	1712	85	288
Kvardek Jaroj de Esp.	199	283	84	55
Labor-Kaj. al Petro	3710	4323	613	469
La Fera Kalkanumo	1204	1521	317	479
La Kemio de l'Univ.	421	464	43	59
La Kom. Manifesto	483	666	183	91
La Labor. Esperant.	772	930	158	619
La Morto de Blanjo	576	629	53	59
La Vojo al Scienco	862	911	49	115
* La Vojoj de formiĝo	314	1522	1208	29
Malgranda Terbiblio	276	340	64	35
Naciismo	1264	1365	101	235
Ni Legu!	–	72	72	578
Nur Volu!	84	197	113	171
Orienta Blovo	538	624	86	54
Petro, noveld. 8500 e.	8189	730	1041	4955
Petro kun rusl. ŝlos.	167	223	56	8
Plena Vortaro	188	718	530	3283
Poemo de l'Plugisto	1590	1643	53	357
Proletaria Kantaro	500	657	157	309
Prologo	1047	1088	41	56
* Rev. en la lingvosci.	382	1250	868	88
Ruĝo k Blanko	607	674	67	63
* Ruĝa Stelo	114	1270	1166	197
Sekspsikologio	408	585	177	126
Soveta Pedagogio	795	822	27	55
Ŝtato k Revolucio	162	276	114	98
Unua Legol., noveld.	1638	2000	362	–
Vortoj de K-do Lanti	1257	1535	278	465
Zamenhof	97	183	86	337
Insignoj:				
grandaj	1063	1523	460	924
malgrandaj	461	708	247	313
Poŝtkartoj il.	153090	154323	1233	1284

Detaligoj pri la librostatistiko. – Tiu ĉi statistiko havas nur la celon montri al la membroj la debiton de la diversaj libroj k la momentan provizon. Tamen pri la libroj signitaj per steleto (*) necesas fari rimarkon, ĉar la nombroj sen tio ne estas kompreneblaj. Tiuj libroj estas presitaj en Moskvo, k parto de la stoko estas ŝtele retenita de CK de SEU (same kiel la mono), kiel unu el la rimedoj por detrui SAT. Ĉar en la antaŭjara statistiko troviĝis indiko pri la *tuta* eldonkvanto, sed en la ĉi-jara la indiko pri la *reala* havaĵo kuŝanta ĉe ni, do la nombroj pri la malpliiĝo ĉe tiuj libroj ne prezentas nur la jaran vendon, sed entenas ankaŭ la *perdon sekve de la ŝtel-reteno de l' stoko en Moskvo.* Fakte estas de ni venditaj dum la jaro: el „Ĥodinka" 64 ekz., „La Vojoj de formiĝo" 63 ekz., „Revolucio en la Lingvoscienco" 88 ekz., „Ruĝa Stelo" 111 ekz. (La diferenco inter tiuj nombroj k la en la 3-a kolono de l'statistiko indikitaj estas la per ŝtelo perdita kvanto.)

Post du semajnoj

aperos la 3-a kajero de la grandformata, bele ilustrita literatur-scienca revuo de SAT

LA NOVA EPOKO

Varbadu novajn abonantojn al ĝi; abonu, se eble, ankaŭ mem **apartan** ekzempleron k disponigu ĝin eventuale por senpaga ekspedo al iu senlabora K-do! (Plena tarifo sur la lasta paĝo de ĉiu LNE-kajero!)

Akcibiletoj de SAT. – Serio A elĉerpiĝis jam de kelkaj monatoj. Akcibiletoj B estas ankoraŭ aĉeteblaj. Tiun ĉi jaron multaj K-doj iam havantaj laboron povis konstati la bonon de la akcibiletoj. Kiam ili nun senlaboriĝis, ili povis facile rekotizi k reaboni „S-ulo"n. Multaj eluzis ĉi tiun avantaĝon k promesis, ke tuj kiam ili povos, ili reaĉetos kelkajn akcibiletojn. Ni ja akceptas ilin ĉiam por membreco, abono aŭ SAT-libroj flanke de ekstersovetiaj akciaĉetintoj. Pro la daŭra ekonomia mizero, per kiu ankaŭ suferas nia movado, ni malaltigis la rentumon al 6 % jare. Tion bonvolu noti la posedantoj de akcibiletoj.

Ricevitaj poŝtaĵoj dum la tempo de 1. 7. 1931 – 1. 7. 1932: leteroj 2406, poŝtkartoj 2178, poŝtĉekoj 3014, poŝtmandatoj 291, presaĵoj 960, pakaĵetoj 575. Sume 9424 poŝtaĵoj.

Ekspeditaj poŝtaĵoj dum la sama tempo: leteroj 517, poŝtkartoj 572, presaĵoj 55 230, pakaĵetoj 1494, bankĝiroj 33 k poŝtĝiroj 255.

Tiuj ĉi ricevitaj k ekspeditaj poŝtaĵoj koncernas nur la Lajpcigan administrejon. Kaj ĉiu, kiu nur iomete komprenas ion pri admin. aferoj, certe taksos la laboron, faritan dum ĉi tiu tempo de antaŭe 3 personoj, depost oktobro de 2 personoj k nun de 1.

C) RAPORTO PRI SENNACIULO K LA NOVA EPOKO.

(Periodo: 1. 7. 31. – 30. 6. 32.)

„S-ulo" aperis ĝis komenco de oktobro 1931 sur 8 paĝoj, ĉiusemajne, poste sur 12 paĝoj ĉiun duan semajnon, ĝis jarfino 1931 en la formo de duoblaj n-oj, poste kiel unuopaj n-oj same ampleksaj ĉe plimalaltigita abontarifo. Ni ne bezonas akcenti ĉi tie, ke la daŭranta k pli akre sentiĝinta ekonomia mondkrizo estas la *ĉefa* faktoro, kiu devigis nin al limigo de la paĝaro k sekve pli severa elekto de la por presigo akceptita materialo. Ni elstarigu unu *pozitivan* faktoron: malapero de la polemikaj artikoloj, refutado de kalumnioj ktp. de sur la paĝoj de la gazeto depost la Amsterdama Kongreso, se ni ne konsideras kelkajn esceptojn.

„S-ulo" gardis sian *ĉiaman* karakteron: ĝia enhavo konsistis el materialo informa, eduka, kultura diverstendenca k sekve konforma al la principo de l' supertendenceco, rekomendata per ĉiuj kongresaj rezolucioj k eĉ per la unua paragrafo de la SAT-Statuto.

Pure informaj artikoloj, sen reliefigo de la tendenco de l' verkinto, kun ofte tre interesa enhavo, aperis cetere, senditaj el granda nombro da landoj k regionoj, eĉ el k pri Sovetio, kvankam de tie – kun unu-du esceptoj – ni ne ricevis senperan materialon; kiel vi scias, tiu fakto ne rezultas el malemo de tieaj K-doj kunlabori, sed el simpla saĝa sindeteno por ne suferi la sankciojn de l' CK de SEU.

La limigita spaco devigis nin ne nur flankenmeti malpli gravan materialon, sed ankaŭ plikoncizigi parte la aperigitajn artikolojn. Ĉar multaj Gek-doj ne scias verki koncize aŭ malatentas niajn tiurilatajn atentigojn en la gazeto. Tio ne estu riproĉo k malkuraĝigo por tiuj, kies skribema plumo kvazaŭ trudas al ili plenigi foliegojn. Sed ili almenaŭ ne grumblu, se la redaktoro senbalastigas iliajn skribaĵojn. Ni estu tamen justaj k diru, ke ni konstatis plibonigojn tiurilate ĉe niaj kunlaborantoj k seriozajn klopodojn de kelkiuj verki kiel eble plej koncize, objektive k precize. . .

En la raportjaro aperis 196 grandaj artikoloj, 70 pli malgrandaj (kiel tiuj sub: **Mi volas scii, por nia medito,** iuj diskut-artikoletoj ktp.). La respondaj nombroj por la antaŭa jaro estas 285 k 53. Krome aperis 13 versaĵoj (same multe kiel antaŭjare). En la nomita nombro estas entenitaj 10

„Tagoj el mia vivo“ aŭ parencaj artikoloj (lastjare: 12). El la 196 grandaj artikoloj 26 estis tradukoj, 18 kompiltradukoj, 4 represitaj el aliaj esp-lingvaj gazetoj, do sume 48 neoriginalaj artikoloj (lastjare 49). La elcento estas 1/4 de la tuto (lastjare 1/6).

La sumo de l' supre statistikitaj artikoloj estas 279 (kontraŭ 351 en 1930/31 k 428 en 1929/30). Konsiderante la dusemajnecon de l' nuna „S-ulo“, la regreso ne estas proporcia. Tio fariĝas pli okulfrapa ankoraŭ, se ni rimarkigas, ke en la statistikitaj artikoloj *ne* estas enkalkulitaj la artikoletoj el la rubriko: LA KLASBATALO TRA LA MONDO, nek la rubriko „Reliefaj Okazintaĵoj“ nek la **Fakpaĝoj.** Ankaŭ ne „Tra Esperantio“ kun ĉiunumere almenaŭ 2 pli grandaj artikoloj.

La relativa multnombreco da artikoloj malgraŭ limigita paĝaro, eĉ pli limigita ankoraŭ per la intermita apero de „LNE“, estas konsekvenco de la apero de koncize verkitaj, aŭ koncizigitaj raportoj. Fakte nur en la unua parto de la raportperiodo aperis artikolegoj daŭrigitaj tra pluraj numeroj, same kiel en antaŭaj jaroj, k ili cetere en supra statistiko estas kalkulitaj nur kiel *unu:* ekz. la artikolserioj pri la Kvinjarplano, la impresoj el Svedio, k. a. Felietona beletra materialo preskaŭ ne aperis pro manko de spaco; sed por ĝi nun estas trovita loko en LA NOVA EPOKO.

El la **Fakpaĝoj** aperis la Pedagogia Paĝo 5-foje, la Liberpensula Paĝo 5-foje, La Junulara Paĝo 3-foje. La Liberp. Paĝo estis antaŭata de la rubriko „Kontraŭ la dogmojn“, kiu aperis en la raportperiodo 4-foje; alia rubriko „Scienco k Tekniko“ aperis 8-foje k estas depost reapero de LA NOVA EPOKO transkondukita al ĉi tiu revuo. La Junulara Paĝo aperis tiel malofte, ĉar dum monatoj la redaktinto neniun materialon plu alsendis, ĝis malpacienciĝintaj sekcianoj komisiis al K-do Vetig provizore la redaktadon super tiu Paĝo.

La Klasbatalo tra la Mondo aperis en ĉiu numero regule (meze ĉ. 5–6 notoj). Bedaŭrinde la kunlaboro al tiu rubriko estis neregula k hazardeca, k ni estus dezirintaj ricevi pli da originala materialo por tiu grava rubriko, per kiu la K-doj povus pruvi la valoron de peresperanta informservo.

La **Reliefaj Okazintaĵoj** estas novaĵo en nia gazeto, kreita laŭ instigo de aktiva kunlaboranto, K-do Ruus. Oni povus fari la rimarkon, ke la K-doj jam legis la en tiu rubriko amasigitajn faktojn en sia ĉiutaga ĵurnalo. Sed ni respondu al tio, ke la okazintaĵoj ne estas prezentataj al la legantoj per sia gazeto en simila neta aranĝo. Laŭ la lando, en kiu la K-doj vivas, laŭ la partitendenco ankaŭ de la legata ĵurnalo, tiu aŭ alia okazintaĵo estas pligravigata aŭ plimalgravigata. Sekaj faktoj prezentitaj en senpartieca k sennacieca spirito povas havi edukan valoron.

Oni tradukis el „S-ulo“ k enpresis en diversaj nacilingvaj gazetoj **101** artikolojn (kontraŭ 94 lastjare). Kompreneble ni nur statistike povas kapti tiujn, pri kiuj ni ricevis komunikon, Mankas certe multaj en tiu nombro. Oni konstatas, ke estas iom *pli* ol en la antaŭa jaro; tamen antaŭ du jaroj (1929/30) ni atingis la nombron 165. Plej laŭdinde k modele laboris usona K-do 16 285 (el Kalifornio), kies tradukoj el „S-ulo“ aperis sufiĉe regule en tieaj ĵurnaloj. Li ankaŭ estas modela rilate la kunlaboron al „S-ulo“ per interesaj artikoloj pri la vivo en sia regiono.

El la 101 artikoloj aperis 44 en socialdemokrataj gazetoj, 11 en anarkistaj aŭ sindikatistaj, 10 en sindikataj, 6 en komunistaj, 4 en ISK-gazeto, 3 en liberpensulaj, 18 en senpolitikaj aŭ de nepreciza tendenco, 5 en diversaj. El ili temis pri okazoj en la esp. movado 24, pri Usono 11, Italio 8, Japanio 6, Svedio 6, Hispanio 5, Ĉinio 3, Estonio 3, Nederlando 3, Belgio 2, Bulgario 2, Ĉeĥoslovakio 2, Germanio 2, Sovetio 2, Aŭstrio 1, Francio 1, Finlando 1, Litovio 1, pri ĝeneralaj temoj (politikaj) 18.

Tiuj nombroj indikas la gradon de la **peresperanta serva kvalito** de la SAT-organo. Laŭplana eluzado de la materialo aperanta en „S-ulo“ plifortigus tiun servecon k refutus unu fojon por ĉiam la senbazan ripetaĵon, ke la SAT-aparato ne povas servi utile al la laborista gazetaro de l' mondo. La

LA LAKTO-CENTREJO POR ŜTUTGART.

La Ŝtutgarta laktocentrejo funkcias depost 1926. Ĝia ĉefa tasko estas la kiel eble plej laŭcela prizorgo al la loĝantaro de Ŝtutgart rilate al lakto k lakto-produktoj. La loĝantaro de Ŝtutgart bezonas ĉiutage ĉ. 125 000 litrojn da lakto por trinkado, kiuj venas el la ĉirkaŭo de l'urbo diametra je 60 km. Ĉar en tiu ĉirkaŭo estas preskaŭ nur malgrandaj kampulaj mastrumoj, la lakto devenas el miloj da bovinejoj k estas sendata de la korporacioj k kolektejoj kiel eble plej rapide per trajnoj al la urbego. Tial estas tre necese, pritrakti tiun laktokvanton zorge k laŭcele antaŭ liverado al la konsumontoj. Alveninte en la laktocentrejon de Ŝtutgart ĉiu laktujo estas esplorata per rapida procedo. Krome la laboratorio de la centrejo k ankaŭ la polica oficejo pri nutraĵoj elprenas kvantetojn, por ke ili estu esplorataj en la laboratorio respektive en la esplora oficejo de Ŝtutgart rilate al gras-enhavo, acidenhavo, malpura stato ktp. Lakton, kiu ŝajnas ne taŭga por trinkado, oni tuj flankenmetas por alia pritrakto.

La trink-lakton oni unue filtras en la laborejo de l'centrejo, por forigi ĉiujn malpuraĵojn, poste oni ĝin pasteŭrizas[1] t. e. varmigas ĝis 63° C., fine malvarmigas ĝis 3°. Per la pasteŭrizado pereas la malsanigaj bakterioj, tamen la lakto ne ricevas la karakteron de bolinta lakto. Krud-lakton el bovinejoj, kiuj estas sub kontrolado de veterinaroj oni ne pasteŭrizas, sed liveras ĝin malvarm-stata en boteloj. Por la cetera trink-lakto la pasteŭrizo estas polica postulo en Ŝtutgart por sekurigi la konsumontojn.

Por eviti denovan malpurigon de la tiel zorge traktita lakto la plej certa procedo estas verŝo en botelojn, por kiu la Ŝtutgarta lakto-centrejo posedas taŭgan aranĝon. La lakto fluas el la laktujegoj tra verŝ-aparato rekte en la botelojn, kiuj estas aŭtomate fermataj per „alu“ [2]-kapsulo sen interveno per homa mano. La botelojn oni antaŭe meĥanike purigas en aparta aparato, kiu ilin brile purigas. Krom tiu botela lakto oni disdonas la tielnomatan publikan lakton en lad-botelegoj al la lakto-vendantoj, kiuj akceptas matene inter la 4a k 7a la plej grandan kvanton de la por Ŝtutgart necesa trinklakto por alporti ĝin al la klientoj por ilia maten-manĝo.

Puro estas ĉefa principo en la laktocentrejo, tial ĉiuj ejoj tie estas blankkoloraj. La laboristoj estas regule kontrolataj rilate san-staton, ili havas uniforman kostumon, liveritan de la centrejo k lavatan dufoje en ĉiu semajno.

La Ŝtutgarta lakto-centrejo estas unu el la plej grandaj k modernaj entreprenoj tiuspecaj en tuta Eŭropo k estis modelo jam por diversaj ali-urbaj similaj oficejoj.

La „Virtemberga Lakto-Utiligo“, akcia societo, funkciigas la Ŝtutgartan lakto-centrejon; partoprenas la entreprenon je po 1 triono: la urbestraro, kiel reprezentanto de la konsumantoj, la loka lakto-negoco k la agrikultura instanco; tiel estas garantiataj publika kontrolo k egala atento al la diversaj interesoj.

La publiko havas la eblon dum regulaj gvidadoj konvinkiĝi pri puro k laŭceleco de la entrepreno. La partoprenantoj al la SAT-kongreso vizitos ĝin la 7-an de aŭgusto.

[1] Laŭ *Pasteŭr*, franca biologo. — *Red.*
[2] Kredeble *aluminia?* — *Red.*

grado de utilo dependas aliflanke de la viglo k kapablo de stabo el kunlaborantoj, de la raportista lerto k ilia sistemeco en la laboro.

*

Kelkaj vortoj pri „La Nova Epoko". Du kajerojn vi jam havis en manoj; por la 3-a la manuskripto kuŝas nun en la presejo. Materialo ĝis nun ne mankis; tamen bonajn originalojn precipe ni ŝatus ricevi estonte, malpli da poemoj, pli da beletra prozo. Kiel jam aliloke dirite, la nuna solvo pri la aper-maniero de „LNE" estas nur provizora; ĝi estas solvo de kriza tempo. Ni dezirus aperigi ĝin kiel memstaran revuon. Tamen ia bono kuŝas en la nuna solvo; ĉar ĝin ricevas ĉiuj „S-ulo"-abonantoj, havas kontentigon de sia deziro tiuj K-doj, kiuj plendis, ĉar en „S-ulo" ne aperis literaturaj felietonoj. Ankaŭ estas oportune, ke nun la pli grandaj recenzoj pri pli gravaj verkoj, kiuj aperas en Esperantio, ne plu okupos lokon en „S-ulo", sed estas transprenitaj de „LNE", same kiel la rubriko „Scienco k Tekniko".

Ĉiuj legis en la 2-a n-o la kritikojn k aprobojn ricevitajn pri tiu ĉi nov-aranĝo de „LNE" k ankaŭ pri ĝia enhavo. Ni kompreneble zorge atentos la kritikajn rimarkojn k konformigos laŭ ili la revuon tiom, kiom eblas. Kompreneble ĉiam la financa limigo pendas kiel glavo super niaj entreprenoj, ĉio kostas monon, speciale la kliŝoj, k nun ni ne povas pensi pri tio transiri la limon de 20 paĝoj por kajero.

„S-ulo" havis je la fino de junio 1827 pagantajn[1] abonantojn; „LNE" krome havas ĝis nun 78 proprajn abonantojn. Por „S-ulo"-n reaperigi ĉiusemajne, tiu nombro tute ne sufiĉas. Kaj ankaŭ por ke „LNE" plue aperu laŭ la nuna maniero, ni bezonas sesoble pli da apartaj abonantoj al ĝi! La krizo daŭras; malgraŭ tio en kelkaj landoj la nombro da abonantoj plue kreskis (vd. la admin. raporton). Ĉu tiu kresketo povas egaligi la malprogreson, kiun ni suferadas en landoj, kie la senlaboreco furiozas kun speciala akro, kiel en Germanio, Aŭstrio ktp.? Tute ne parolante pri la neeblo por sovetianoj aboni al niaj gazetoj...

Almenaŭ estas konstatinde, ke „S-ulo" aperis regule k en duoble pli impona amplekso ol la folieto de l'Internacianoj kun siaj 6 paĝoj duonmonate k liverataj al la abonantoj nur *unufoje* en la monato! ...

Sed ne sufiĉas al la redaktoro la spaco: estis ofte vere treege malfacile kompili la n-ojn, pro la devigo koncizigi, resumi, forĵeti, prokrasti materialon... Pli ampleksa „S-ulo", ĉiusemajna „S-ulo" devas resti nia celo reatingota post pli malpli longa tempo. Gek-doj! tial... malgraŭ la krizo k la faŝisma teroro en multaj landoj... eluzu zorge ĉiujn varbeblojn, kiuj ekzistas spite ĉio ankaŭ en la nuna periodo! Ne rezignemo, sed entuziasmo regu en viaj koroj k instigu vin al aktiva varbado, por abonigi al niaj organoj tiujn el la laborhavaj laboristoj, kiuj hodiaŭ staras flanke k *ne praktikas esperanton, ĉar ili ne legas sian tutmondan esperantlingvan gazeton!*

[1] La eldonkvanto kompreneble estas pli alta (tial ke tiu nombro ne entenas la ŝanĝ-ekz-ojn k propagandekz-ojn.)

Ĉ) RAPORTO PRI LA LERNANTO.

„La Lernanto" aperis regule en la ĝisnuna formo kun iom ŝanĝita enhavo en la lastaj monatoj, per enkonduko de nova rubriko: „De infanoj por infanoj". En la starigo k funkciigo de tiu rubriko dankinde subtenis nin du diverslandaj instruistoj, K-doj Vitbrod k Burginjon. Ni esperas povi ankoraŭ pli bone elkonstrui ĉi tiun rubrikon, kiun certe volonte legos ankaŭ la plenaĝaj Gek-doj; precipe ĉar la priskriboj de l'etuloj nature estas simplaj laŭ lingva k stila vidpunktoj.

Cetere la Lingvaj Notoj aperis konstante, ankaŭ la ŝaradoj k la humorangulo, same la priskriboj de K-doj pri sia esperantistiĝo. Rakonto kun multaj daŭrigoj ne plu aperis, kiel en antaŭaj jaroj, konforme al deziresprimo de pluraj K-doj ĉe la Amsterdama Kongreso.

Ni volas fine esprimi la deziron, ke kiel eble plej multaj Gek-doj partoprenu per kunlaborado: por ĉiuj rubrikoj de la gazeteto ni bezonas varian, interesan, facile legeblan k plezurigan materialon. La K-doj atentu nur pri tio, eviti naciecaĵojn rilate la verkadon aŭ tradukadon de spritrakontoj k anekdotoj, ĉar la materialo aperanta en „L. L." nepre devas esti tia, ke ĝi estu komprenata de ĉiulandaj Gek-doj.

La klasbatalo tra la mondo

Konstrulaborista batalo en Ĉeĥoslovakio.

La 26. junio[1] ĉi-jare estis fiksitaj la salajroj de l'konstrufakanoj de la ministro por sociaj aferoj. Laŭ tiu tarifo masonisto devus ricevi hore 5.45 ĉ.kr., ĉarpentisto 5.50, simpla helplaboristo 3.65 ĝis fino de 1932. Sed la entreprenistoj ne agnoskis la salajrojn k proponis al masonistoj 5 ĉ.kr. hore, al helplaboristoj 3.30 kr. Kiu ne akceptus tiun proponon, tiu estu maldungita. La 2. majo pro tio eksplodis striko, unuanime decidita de ĉiuj konstrulaboristoj-sindikatanoj. Post longaj intertraktoj la socialdem. sindikato sukcesis (25. k 26. majo) atingi kontrakton inter labordonantoj k dungitoj, al kiu ankaŭ aliĝis la kristan-socialista sindikato. Nacisocialistoj k komunistoj ĝis nun ne atingis kontrakton. La 30. V. ĉiuj konstrufakanoj ekkomencis labori laŭ la kondiĉoj atingitaj de l'soc. dem. sindikato, t. e. la supre nomitaj salajroj ĝis 4. 7. 32, k ekde 5. 7. masonisto ricevas 5.30 ĉ.kr., ĉarpentisto 5.35 k helplaboristo 3.60, ferfleksistoj, betonistoj k ŝelistoj (? Red.) 4.75 hore en la unua salajroklaso ĝis fino de 1933. Nacisocialistoj k komunistoj, ne havante kontrakton, instigas al nova striko.

E. Tischer, Aussig.

[1] La dato kredeble ne ĝustas! (vd. poste). — *Red.*

Politika murdo en Polio.

La 23-an de junio en stacidoma restoracio de Szczakowa fama provokisto k faŝisto Czuma mortigis K-don Pocztowski, membron de ĥemia sindikato. Kvankam la murdo okazis en publika loko k bestmaniere, nek Czuma nek liaj helpantoj estis arestataj. La murdito havis edzinon k tri infanojn. Czuma siatempe kreis tielnomatan maldekstran P.P.S. (soc. partion) k traktis je ĝia nomo kun la en Polio kontraŭleĝa kom. partio. La gvidantoj de l'maldekstra PPS estis juĝataj, la partio malpermesata; per la proceso montriĝis, ke Czuma estas simpla provokisto. Nun li apartenas al registara partio k estas unu el la gvidantoj de faŝistaj sindikatoj.

Sanga vilaĝana ribelo (Polio).

La 1-an de julio okazis en distrikto Lisko apud Lvovo (Lemberg) — Orienta Galicio — sanga vilaĝan-ribelo, laŭ oficiala komuniko aranĝita de komunistoj, kiuj disfamigis sciigon, ke la registaro volas denove enkonduki servuton. Du bienoj estis atakataj k bienuloj grave vundataj. Policanoj k armeo post grandaj penoj dispelis la amason: 5 vilaĝanoj estis mortigitaj, 8 vunditaj.

Soc. Gazetinformejo Esp-ista, Varsovio.

DIVERSAJ NOTOJ

Pri ferivizitoj.

Mi tute konsentas la opinion de K-do Koldic (vd. la n-on 390) pri ferivizitoj. La tutmondaj esp-istoj pli ol ĝis nun devus disponigi sin k siajn hejmojn por somere gastigi eksterl. Gek-dojn. La SAT-estraro tiucele helpu disponigante malgrandan spacon en „S-ulo" por la celo. — 2 svedaj K-doj vizitis nin antaŭ kelkaj tagoj. Ili antaŭanoncis sin k venis bicikle de Stokholmo al Leŭvardeno (Holando). Ni komune ekskursis; vizito k ekskurso havis laŭ ni ankaŭ grandan propagandan valoron. Se iel eblas, ni reciprokos venontjare la viziton.

Wiersma (17 527), Leuvarden.

Kompletigo.

En mia artikolo „Stranga sinteno de aŭstria sindikato" (n-o 390) pro forgeso ne estis citita la sumo, kiun ricevas senlaborulo de la industrioficista sindikato post 25-jara membreco (vd. piednoton sur pĝ. 199). La sumo estas proks. 500—1000 ŝil. (laŭ la pagita kotizo), dum metallaboristo ĉiukaze ricevas sume nur 72 ŝil. Jen grava diferenco!

Klarvidulo.

D) RAPORTO DE LA-KONTROL-KOMITATO DE SAT por la jaro 1931/32.

La nuna jaro estis multe pli kvieta por la K. K. ol la pasinta k ne necesos ampleksa raporto por prezenti la laboron faritan.

La 11. dec. 1931 la Direkcio sciigis al la Brusela SAT-anaro, ke la konsisto de la K. K. estis validigita. La K. K.-on konsistigis do la K-doj G. Basteels, G. Stalens k M. Van Aelst; tiu lasta estis sekretario.

La 3. marto 1932 la K. K. kunvenis k aprobis la resendon al K-do Soares de ĉiuj dokumentoj, kiujn li sendis al la antaŭaj K. K.-oj rilate la aferon *Adamson-Soares*, kiu tiel likvidiĝis plej oportune. Ni ekzamenis la cirkuleron de la Direkcio de SAT al la Ĝen. Konsilantaro k aprobis la laboron faritan de la Direkcio. La 14. aprilo la K. K. ekzamenis la peton de SAT-Direkcio rilate la esploron de la konduto de *L. Bergiers* (SAT-ano 630). Ni decidis peti la kopiojn de ĉiuj korespondaĵoj interŝanĝitaj inter B. k la Direkcio k inviti B. al kunveno de 28. aprilo por aŭskulti lian defendon.

La kunveno de 28. IV. ne okazis pro malĉeesto de B. Ĉiu K. K.-ano havis en manoj la dokumentojn dum almenaŭ 1 semajno, k la 2. junio ni ree kunvenis k decidis peti B., por ke li ĉeestu nian kunvenon de la 9. junio. B. sendis skriban defendon k ne ĉeestis la kunvenon de la 9. junio, dum kiu K-doj Basteels k Van Aelst ekzamenis la defendon de B. k decidis ĝin havigi al K-do Stalens, kiu malĉeestis. La 23. junio ni kunvenis k reekzamenis la aferon Bergiers k fine decidis proponi eksigon de Bergiers el SAT (vd. detalon en ĉi tiu n-o de „S-ulo“).

Ni agis ĉiam kun la deziro esti justaj k labori por la bono de SAT. Ni do petas la K-dojn aprobi nian laboron.

Bruselo, 26. VI. 1932.

Por la K.K. de SAT, sekretario *M. van Aelst.*

Subskribis *G. Stalens, L. Basteels.*

Kontrolkomitato de SAT en Bruselo. Jaro 1932.

DECIDO
pri L. Bergiers (SAT-ano 630).

Sekve de invito de SAT-Direkcio, la K. K. de SAT esploris la konduton de L. Bergiers rilate al SAT. Kelkvorte ni memorigu pri kio temas: K-do L. Bergiers estis elektita dum la SAT-kongreso de Londono kiel sekretario de la K. K. k la Brusela SAT-anaro kompletigis la komitaton per elekto de K-doj Jeanneret k Van Aelst. Post kelkaj monatoj Jeanneret eksiĝis kun akraj atakoj kontraŭ Bergiers ĉefe. La SAT-anaro de Bruselo ree kunvenis k anstataŭis Jeanneret per K-do Stalens.

Por la SAT-kongreso de Amsterdam, Bergiers preparis ridindan raporteton tute ne spegulantan la laboron de la K. K. La plimulto (Stalens k Van Aelst) malaprobis tiun raporton k petis kunvenon de la K. K. por starigi pli kompletan k plí precizan raporton. Bergiers rifuzis kunvoki tiun kunvenon k rifuzis la dokumentojn por malebligi al Van Aelst k Stalens redakti sian raporton. Li ankaŭ rifuzis sendi la dokumentaron al SAT-Direkcio pretekstante, ke li nur rajtas ĝin transdoni al la sekretario de la K. K. elektota en Amsterdam.

K-doj Stalens k Van Aelst — helpe de parta dokumentaro posedata de SAT-Direkcio, tamen povis fari sian raporton, kiu aperis en „S-ulo“ n-o 355.

Sed, Bergiers, kiu pretendis, ke li nur rajtis transdoni la dokumentojn de K. K. al la en Amsterdam elektota sekretario de K. K. veturis al Amsterdam k ne metis la dokumentojn je la dispono de la kongreso, sed donis ilin en manojn de konata SAT-opoziciulo, ano de tiu opozicio, kies ĉefojn Bergiers eksigis kiel K. K.-ano. Bergiers mem konfesas, ke li ne plu sukcesos ricevi tiun dokumentaron de la opozicio.

Jen do la konduto, kiun ni devis juĝi.

Ni petis de la SAT-Direkcio kopiojn de ĉiuj leteroj interŝanĝitaj kun Bergiers. Ni ilin ricevis. Ni invitis B. al kunveno de 28. aprilo, por aŭskulti lian defendon. Li skribis, ke pro manko de tempo li povas nek ĉeesti nek fiksi mem alian kunvenon. La K. K. rekunvenis la 9. junio por aŭskulti Bergiers, esperante, ke lia laboro estos iom malpli temporaba. B. ne venis, sed sendis skriban defendon, kiun legis K-doj Van Aelst k Bastels dum la kunveno k kiu estis sendita al K-do Stalens pro lia malĉeesto.

Konsiderante la faktojn k la defendon de Bergiers, la K.K. unuanime konkludis:

1) ke Bergiers provas miksi kun la akuzoj pri sia konduto kontraŭ SAT aferon tute apartan, rilate al eldono de lia libro „Ili“ ĉe SAT [1];

2) ke Bergiers — en sia defendo — konfesas sian kulpon, sian „eraron“, sed ke tia konfeso havas *nenian sinceron, ĉar Bergiers tro facile k kutime pekas k tiom pli facile pentas k konfesas sian „eraron“, kiam la malsukceso de lia peko, „eraro“, evidentiĝas.* La esploro de la agoj de B. depost la Londona kongreso tion klare montras;

3) ke B., gvidata de sia granda ambicio k konata memadmiro, agis malsincere k perfide kontraŭ SAT;

4) ke sekve — laŭ artikolo 8 de la Statuto — ili proponas al Plenum-Komitato de SAT eksigi Bergiers pro liaj agoj kontraŭ la interesoj de SAT, kun tiu pligravigo, ke li plenumis tion en momento, kiam la vivo de SAT estis endanĝerigita de senskrupululoj.

En Bruselo, la 25. junio 1932.

M. Van Aelst (155). L. Basteels (1837). G. Stalens (5895).

[1] La K-doj, kiuj ne estas informitaj pri tiu afero, eksciu, ke B. antaŭpagis la preskostojn por la eldono de sia verko „ILI“ kun la kondiĉo, ke la sumo estu al li repagota laŭ la disvendo de la volumoj. La sperto montris, ke la verko ne havas la ŝaton de la esp. publiko k nur 189 ekz.-oj disvendiĝis en la daŭro de 12 monatoj. La 27. jan. 1931 ni jam repagis al B. 160 mk.g. La nuna kreditsaldo de lia konto estas mk. 222.50; sed ĉar B. ne liveris al SAT la tutan stokon, li do jam tenas pli ol sufiĉan kompenson por egaligi tiun saldon en manoj!

En sia kunsido de la 8. VII. 32 la Direkcio unuanime aprobis la proponon de la K. K. k sekve la perfidulo Bergiers estas eksigita el SAT.

La konkludoj al la raportaro estos prezentataj ĉe la Kongreso de la Direkcio.

Aldona teksto.

Rilatas al la sciigo en la Raporto de la Direkcio (komparu la n-on 391, pĝ. 210, 2-a kolono supre).

4-an de julio 1932.

Al la estraro de
(nomo de la L.E.A.)

Estimataj Kamaradoj!

Kiel vi sendube scias, ĉe la XI-a Kongreso, en Amsterdamo, estis elektata Komisiono kun la tasko prilabori dum la jaro projekton de Statuto, submetota al la diskutado ĉe la venonta Kongreso. Pro diversaj kaŭzoj tiu Komisiono komencis iom prokraste sian laboron k nur en la n-o 391 de „S-ulo“ aperos la prilaborita teksto. Kiel vi povos konstati per ĝia legado, estas parto, kiu koncernas la rilatojn inter la LEA k SAT. Tial ni ŝatus, ke via Asocio konigu al ni sian opinion pri la demando k eventuale faru konkretajn proponojn, submetotajn al diskutado en Ŝtutgart. Estas ankaŭ dezirinde, ke vi komisiu iun el viaj membroj inter tiuj, kiuj jam estas SAT-anoj, por prezenti vian vidpunkton pri la reorganizado de nia movado. Ni deziras, ke la kunlaborado inter la por- k peresperanta aparatoj estu pli k pli intima, pli k pli racia, por ke ĉiuj fortoj el la lab. esp. movado povu esti utiligataj kun kiom eble plej da profito k efiko. Ĉi-okaze ni opinias necese memorigi vin pri la principoj, kiuj ĉiam gvidis nin k al kiuj ni nepre volas resti fidelaj:

1) Akcepto nur de personoj, konfesantaj la klasbatalon kiel socian fakton k konvinkitaj pri la neceso forrenversi la kapitalismon.

2) Senpartieco (t. e. ke anoj el ĉiuj tendencoj el la lab. movado povas aliĝi al nia Asocio).

3) Sennacieca strukturo.

4) Kompetento de la suvereno (la tuta anaro), kio signifas, ke nur personoj scipovantaj praktike uzi esp-on

k informataj pri nia movado povu influi ties gvidadon.

Rilate al detalaj organizaj aranĝoj, kiuj ne kontraŭus tiujn principojn, ni ne havas difinitan opinion k estas pretaj akcepti kiun ajn proponon, eventuale de vi farotan, kiu ĉe ekzameno k serioza pridiskutado montriĝos praktika k laŭcela.

En la espero, ke vi konsideros ĉi tiun nian klopodon inda je via atento, ni salutas vin

fratece k sennaciece
POR LA DIREKCIO DE SAT.
E. Lanti.

Proponoj al la XII-a Kongreso de SAT.

Rezolucio de SAT-Rondo Nov-Jorka akceptita en junio 1932.

SAT-Rondo Nov-Jorka, pridiskutinte okazontan kongreson de SAT en Ŝtutgart, konstatas, unue: ke malgraŭ kelkfojaj deziresprimoj de kongresoj ne efektiviĝis la intenco k deziro de multaj SAT-anoj, ke

lokaj SAT-Rondoj fariĝu oficialaj organoj de SAT,

malgraŭ la evidenta ekzisto de tiaj. SAT-Rondo Nov-Jorka kondamnas tiun staton tiom pli ke per ekzisto de la konvencio inter SAT k LEA-oj SAT-Rondoj estas tamen malrekte agnoskataj.

Tial ĝi proponas al la kongreso: „oficialigi per enstatutigo lokajn SAT-Rondojn k difini al ili la sekvantajn taskojn: (aldonota al la statuto)

Kongrespropono 9.

Aniĝo al SAT povas okazi nur pere de la loka aŭ plej najbara SAT-Rondo. Ĝi havas ekskluzive la rajton akcepti aŭ malakcepti aliĝemulojn. Tamen en okazo de malakcepto ĝi devas atentigi la malakceptiton, ke kontraŭ tiu decido ekzistas apelacirajto ĉe la Ĝenerala Konsilanto en la koncerna horzono, kiu esploros la aferon k decidas post interkonsento kun la Kontrol-Komitato, same kiel ĉe eksigoj laŭ artikolo 8. Ĉiu membro de SAT devas aliĝi al loka rondo k, kie tia ne ekzistas, membro devas aliĝi al la plej najbara. Membroj devas obei ĉiujn decidojn de sia rondo, escepte tiajn, kiuj evidente ne estas plenumeblaj pro la distanco inter la loka rondo k la membro. Ĉiu SAT-Rondo devas konduki siajn aferojn k plenumi la SAT-taskojn aŭ servojn laŭ la statuto k la direktivoj de la Plenum-Komitato. SAT-Rondo povas konsile rezolucii pri SAT-aferoj. Malplimulto havas la rajton ankaŭ formuli sian vidpunkton. Ambaŭ partioj havas la rajton postuli aperigon en „S-ulo“, sed en okazo de evidenta misuzo de tiu rajto, laŭ la juĝo de la SAT-gvidanto, tiaj rezolucioj devas esti transdonataj al la sekretario de l'Ĝen. Konsilantaro, kiu submetas demandon pri publikigo al siaj kolegoj;

SAT-Rondo Nov-Jorka konstatas due: ke estas nepre necesa novelekto de la Ĝen. Konsilantaro k tial proponas al la kongreso:

Kongrespropono 10.

„*mandati la Plen.-Kom. aranĝi tian elekton*“. Avertas plej energie kontraŭ renovigo de la mandato al la nuna Ĝen. Konsilantaro k kontraŭ eventuala ŝanĝo en la statuto kun la intenco sensignifigi tiun organon de la Asocio. Male, ĝi konsilas plene ekfunkciigi tiun organon laŭ la statutaj senco k literoj k tial proponas aldoni al paragr. 18 jenajn kompletigajn liniojn:

Kongrespropono 11.

Al 11: „La Direkcio elektas unu konsilanton kiel sekretarion por la Ĝ. K. Tiun elektiton tamen la Ĝ. K. povas aŭ aprobi aŭ anstataŭi per alia el sia vico.

Al 19: La elektita sekretario petas en la oficiala organo pri proponoj por elekto de Plenum-Kom. Validas nur proponoj, kiuj estas faritaj laŭ paragr. 19, tio estas, ĉiuj proponitoj devas troviĝi en unu urbo, kiu en okazo de aprobo de la Ĝ. K. tiam fariĝas la sideja urbo.

Al 15 dua alineo: La Sekretario ricevas ĉiun planon, sugeston, konsilon aŭ proponon de iu ajn organo de la asocio, sed ĉefe de la prezidanto de la Plenum-Kom. (la tielnomita SAT-gvidanto), notas ĉion en la oficialaj cirkuleroj k dissendas almenaŭ ĉiumonate po unu al ĉiu Ĝen. Kons. Ĝen. Kons. notas sian konsenton, malkonsenton aŭ opinion sur aparta folio, kiun la sekretario devas alfiksi en la rondirantajn kajerojn.

ĈIUJN

de vi bezonatajn esperantaĵojn, el kiu ajn eldonejo (librojn, broŝurojn, lernilojn ktp) vi povas mendi ĉe la

ADMINISTRACIO DE SAT,
Kolmstrasse 1, Leipzig O.27.

Notu bone tion en la memoron k neniam forgesu, ke aĉetante ekskluzive ĉe SAT vi tre efike helpas al ĝi por „ŝtopi la breĉon“!

Al 17: En neniu okazo la Plenum-Kom. havas la permeson alpreni la funkciojn de la Ĝen. Kons. Ĉiuj artikoloj, kiuj konfliktas kun tiuj ĉi modifoj estas nuligataj;

SAT-Rondo Nov-Jorka trie: kondamnas plej severe la sintenon de la Aŭstria Lab. Ligo Esperantista k denuncas ĝin antaŭ la tuta lab. esp-istaro kiel provon meti SAT sub la kontrolon de la Socialdemokratio k de la II-a Internacio. Ĝi nomas nunan favoran subtenon al SAT flanke de ALLE trompa manovro por ekpreni en siajn partiecajn manojn la SAT-aparaton. Per sia deklaro, „ke ĉiuj konsciaj socialistoj ... devas daŭrigi en SAT la batalon *POR ALIFORMIGO* de la internacia laborista esp. organizo“ ĝi publike konfesas, ke ĝi ne akceptas la SAT-statuton en bonintenca spirito, sed ligas siajn anojn ŝteleniri sub pretekstoj en SAT por realigi siajn partiecajn celojn.

SAT-Rondo Nov-Jorka insistas pri la intertendenca karaktero de SAT, salutas sinceran subtenon al SAT flanke de ĉiu ajn klasbatala lab. organizo, sed alvokas ĉiujn SAT-anojn k aparte ĉiujn socialdemokratajn membrojn de SAT indigne rifuzi aliĝon ĉe la fronto de partifanatikuloj, kiuj ne maltimas riski novan skismigon. SAT-Rondo Nov-Jorka ne postulas mallojalon de iu ajn membro de partio, sed ĝi insistas „ĝuste kompreni“ k bone taksi lojalon vere profitdonan al lia partio, k ne opinii, ke nur „nia“ partio devas kontroli la SAT-aparaton. SAT-Rondo Nov-Jorka alvokas SEA difini sian vidpunkton pri la koncerna ALLE-rezolucio tute klare k malkaŝe k admonas SEA fidele laŭ siaj faritaj promesoj rifuzi eniĝi en la vicoj de skismo-ŝatantoj. Ni alvokas la kongreson:

Kongrespropono 12.

mandati la Plenum-Kom. severe gardi kontraŭ tiu manovro k bari al ALLE-anoj aliĝon al SAT ĝis nuligo de la koncerna rezolucio.

SAT-Rondo Nov-Jorka revuante aktualajn intern-organizajn taskojn de la kongreso petas la kongreson, ke ĝi dediĉu almenaŭ unu aŭ du tagojn al debatoj, kiel plej bone efektivigi la SAT-servojn k taskojn.

Nur per kontentiga solvo de tiu ĉi problemo — kiel apliki esperanton en la klasbatalo, organizite k sistemece, por la profito de la klasbatala proletaro tutmonda —, la kongreso estos farinta sian devon. Kun la peto serioze pritrakti ĉiujn al la kongreso prezentotajn proponojn, konsilojn aŭ sugestojn, ni deziras, ke la XII-a Kongreso de SAT signalu novan ekiron sur vojo de ĉiam pli grandaj k volonte agnoskataj atingoj.

Vivadu SAT k ĝia XII-a kongreso!

Laŭ instrukcio de SAT-Rondo Nov-Jorka, la 17-an de junio 1932.

La peranto: T. Veder, SAT-ano 1307.

Kongrespropono 13.

Por kontentige solvi la organizan problemon ni proponas al la ĉi-jara kongreso, ke ĝi esprimu la deziron,

a) ke SAT interrilatu kun la landaj lab. esp. asocioj (escepte la pure komunistaj, kiuj samtempe en Berlino fondas propran Internacion) celante la kunfandiĝon tiele, ke SAT fariĝu la centra Ligo k la LEA-oj la sekcioj,

b) ke SAT liveru al tiuj Sekcioj (landaj asocioj) la organojn „Sennaciulo“ k „La Nova Epoko“ por la memkosta prezo, kiuj peros ilin al siaj membroj kune kun eventualaj landaj sciigoj (bultenoj),

c) ke ĉiu LEA-ano estu do samtempe membro de SAT per unu kotizo dividota inter SAT k la koncerna LEA; senenspezuloj estu favorataj je la alto de la pagenda kotizo;

ĉ) ke ĉiuj membroj estu samrajtaj; ne ekzistu diferenco inter „aktivaj“ k „aspirantaj“ membroj.

d) La Jarlibro ne plu estu eldonata, ĉar ĝia valoro estas jam tre duba k ĝi kostas grandajn monsumojn.

Se oni sukcesus fari tian interkonsenton, SAT ricevus pli vastan agadkampon ĉar ĝi apogus sin poste sur laborkapablajn organizoj anstataŭ sur izolajn membrojn. La landaj asocioj ne plu estus fremdaj al SAT, sed subtenus ĝin ĉiamaniere, ankaŭ finance. Per tio nia movado ricevus novajn impulsojn rilate al eldono de literaturo ktp. Ke la nuna stato ne estas kontentiga, pruvas la fakto, ke SAT nur havas proksimume 2000 membrojn en Tutmondo k ĉiam devas barakti kontraŭ la „breĉo“. La proponoj do celas forigi ĉi tiun ne-indan staton k alporti freŝan viglon en la movadon. Ni petas, ke ili estu voĉdonataj k akceptataj.

536, 1358, 3803, 4369, 4562, 6075, 6680, 6712, 6826, 7658, 8439, 9446, 10622, 10795, 11325, 11441, 12787, 13700, 13914, 14173, 14283, 14551, 14923, 15364, 15484, 15503, 16462, 16647, 16927, 16928, 16986, 17007, 17008, 17207, 17418, 17499, 17547, 17562, 17563, 17633. (Nur *partan* efektivigon deziras: *5708, 13234, 14957)* — ĉiuj el Aŭstrio.

XII-a Kongreso de SAT en Ŝtutgart.

6.—11. aŭgusto 1932.

5-a komuniko.

Akceptejo: Ni instalos de la 6-a ĝis 7-a de aŭgusto en la ĉefa stacidomo oficialan akceptejon. Ĝi troviĝas tie vid-al-vide de la staciaj kajoj 10 k 11. La koncerna salono estos ekkonebla per afiŝo kun la teksto: „12-a SAT-Kongreso.“ Ĉeestos Gek-doj seninterrompe de la 8-a ĝis la 24-a horo. Pli malfrue alvenontaj kongresontoj anoncu tion tuj, por ke ankaŭ ili estu akceptotaj. Alvenintoj iru unue al la akceptejo, por tie ekscii pri siaj loĝejoj k akcepti la kongresaĵojn. Respondecas pri loĝ-aferoj K-do Neumann.

Kongreskartojn ni forsendis nur ĝis la 20. julio. Kiu ne ricevis karton, postulu ĝin en la akceptejo.

Tendojn Gek-doj povos starigi en iu laborista arbarhejmo en la proksimo de l'urbo. Antaŭa anonco necesas.

Radio-disaŭdigo k kongresa poŝtejo: Ĉu ili povos esti aranĝataj, ankoraŭ ne estas findecidite.

*

Je la fino ni petas ĉiujn Gek-dojn, kiuj reprezentos ĉe la salutvespero de l'Kongreso lab. organizojn aŭ grupojn, *tuj skribe* konigi tion al ni. Same tiuj eksterlandaj Gek-doj, kiuj parolos (mallonge) en la varbkunveno, estas petataj sin anonci. –

Malgraŭ tre diversaj malbonaj cirkonstancoj nia Kongreso nepre sukcesos k estos evidenta pruvo pri la vivanteco de nia organizo!

Estu bonvenaj en Ŝtutgart! Ĝis baldaŭ! Vivu la klasbatalo! Vivu SAT!

O. K. K.

*

5-a listo de partoprenontoj.

152	15857	Dietsch Aug.,	Mulhouse	(Francio)
153	14069	Lang Anton,	Augsburg	(Germ.)
154	2461	Artigas-Trigo E.,	Zaragoza	(Hisp.)
155	16902	L.E.S. „Nova Vojo",	Lisboa	(Port.)
156	12278	Schmutz Jeanne,	Allschwil	(Svis.)
157	16340	Wilson Eva,	Halifax	(Anglio)
158	509	Limousin E.,	Paris	(Francio)
159	1781	Kerr J. M.,	Denver	(Usono)
160	5934	Weber M.,	Denver	(Usono)
161	10865	Sommer A.,	Hagen	(Germanio)
162	–	Scholze Gertr.,	Zittau	(Germanio)
163	13603	v. Houten G.,	Amsterdam	(Hol.)
164	1358	Bauer Jos.	Innsbruck	(Aŭstrio)
165	–	Kerkhof C.,	Amsterd.	(Holando)
166	14593	Kryt Piet,	Amsterdam	(Holando)
167	17307	Koc V.,	Plzen	(Ĉeĥoslovakio)
168	–	Mack Jos.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
169	–	Fide Karl,	Frankfurt-M.	(Germ.)
170	–	Michel E.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
171	–	Schuck L.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
172	–	Styrsa J.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
173	–	Zahn Ad.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
174	–	Lang M.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
175	–	Puff Leon,	Frankfurt-M.	(Germ.)
176	–	Metz J. J.,	Amsterdam	(Holando)
177	308	Bös Burkh.,	Frankfurt-M.	(Germ.)
178	17850	Hoffmann Fr.,	Frankf.-M.	(Germ.)
179	17851	Hoffmann E.,	Frankf.-M.	(Germ.)
180	15696	Lüthi Gr.,	Zürich	(Svisio)
181	17769	Breeuwsma P.,	Oudendyk	(Hol.)
182	17486	Meulenbeld P.,	Amsterdam	(Hol.)
183	17722	Yssenagger H.,	Amsterdam	(Hol.)
184	61	v. d. Heid A.,	Dortmund	(Germ.)
185	–	Klingeberger H.,	Herford	(Germ.)
186	–	Sudau W.,	Herford	(Germ.)
187	17703	Koomen J.,	Assendelft	(Holando)
188	14171	Lang, Alph.	Metz-Sablon	(Francio)

*

Ni kvitancas donacon de K-do *Azorin* (Cordoba): 5 fr. fr.

Magdeburgaj SAT-anoj traveturos per aŭtomobilo.

sekvantajn urbojn: Ekveturo de Magdeburgo, 5-an de aŭg., 3-a h. matene; tra Egeln, Gröningen, Halberstadt, Wernigerode, Braunlage, Lauterberg, Herzberg, Göttingen, Witzenhausen, Waldkapel, Eisenach, Barchfeld, Wasungen, Meiningen, Neustadt, Boklet, Bad Kissingen ĝis *Schweinfurt* (je la 18-a h. por tranokti). 6-a de aŭg. matene je la 8-a: ekveturo de Schweinfurt tra Würzburg, Mergentheim, Dörzbach, Künzelsau, Hall, Baknank al Ŝtutgart (je la 16-a h.). Ĉiuj kongresontoj povos kunveturi por 0,02 mk. por kilom. Skribu al Esperanto-SAT-Heim, Grünearmstr. 14, *Magdeburg.*

MI VOLAS SCII...

Responde al K-do 5320 (vd. la n-on 389) mi opinias jenon: Estas holanda proverbo „Pli bone estas prizorgado al sana korpo ol sanigi ĝin dum malsano", do ne plej grave estas: kion vi faros dum milito? sed: kion ni faras *antaŭ* la milito? Atentu! La militistoj ege ekzerciĝas por esti pretaj, se eksplodas milito. La fajrobrigadanoj multe ekzerciĝas por esti pretaj dum brulo. La anoj el la „Unuiĝo por savi dronantojn" ofte ekzerciĝas por esti pretaj, kiam troviĝos dronantoj en la akvo...

Kion ni faras? Malmultaj rifuzas militservi, tre malmultaj rifuzas fabriki militmaterialon, granda nombro da homoj tute ne havas pensojn pri tio.

Kion mi faris? Bedaŭrinde mi jam havas malagrablajn spertojn. Preskaŭ la milito estis finita, kiam la holanda gvidanto de la S.D.A.P. (socialdem. partio), P. J. Troelstra, ordonis revolucion. Ni ĉiuj estis pretaj aresti la generalojn, doni la armeojn en la manojn de niaj soldataj K-doj. Tiam okazis kontraŭordono: La revolucio estis malordonata de la ordoninto...

Multaj K-doj estis devigataj ŝanĝi sian sintenon por ne iri en malliberejon. Mi devas averti ĉiujn revoluciemajn K-dojn, por ke ili ne denove estu uzeblaj en la manoj de la „gvidantoj".

Kion mi faros? Momente mi ne povas diri, sed manoj trovos la taskon indan je revoluciema karaktero! Kion ni povas fari nun? Propagandi, propagandadi militrifuzon, rifuzon de militransportoj, rifuzon fari militmaterialon, k kiel ekzercon jam de nun fari ĝeneralajn strikojn por malhelpi la militon.

Fred. Ples (16 459).

DISKUTEJO:

Laboristaro k monpolitiko.

Monpolitiko –, ĉu ekcistas pli aktuala temo por la laborista klaso ol ĉi tiu?

Trafoliumante hodiaŭ la ĵurnalojn laboristajn k aliajn, ni preskaŭ ĉiutage povas legi novajn okazintaĵojn rilatantajn al ĉi tiu temo. Nur antaŭ ne longe ni povis sciiĝi la plej interesajn aferojn, ke registaroj inklinas forigi la oran valuton, k ke registaroj eĉ estis devigataj forigi ĝin, ekz. Anglio. La krizo ampleksiĝas, k pli k pli montriĝas, ke la kriza problemo estas kunligita kun la monproblemo. Oni povas esti ano de kiu ajn politika tendenco, sed pri tio oni devas konsciiĝi, ke la mona problemo k la monpolitiko estas nepre gravegaj aferoj por la batalema k liberigema proletaro. Sed fakte en la plej multaj el la gazetoj de politikaj organizoj k partioj oni tro malatentas tiujn ĉi por la forigo de la ekspluatado gravajn aferojn. Ĉu efektive la monpolitiko meritas tiun ignoron? Ĉu ni laboristoj k senlaboruloj ne havas kaŭzon por enprofundiĝi en tiuj temoj? Certe, jes.

Kial la plej multaj laboristoj malatentas la monon en la politika batalo, k konsideras la monon kapitalisman kiel tute sendanĝeran aferon en la ekonomio? Unue pro tio, ke ili ĉefe estas disĉiploj de *Marks, Lenin* aŭ *Kropotkin*, kiuj estas teoriuloj pri komunismo. La komunisma ekonomio ne bezonas monon, pro tio oni komprenas, ke ili ignoris la monproblemon aŭ almenaŭ ne kreis kontraŭkapitalisman monsistemon. Due la registaroj de la ŝtatoj k ĝenerale la kapitalista klaso bone sciante pri la utilo de tia monsistemo (ora mono por siaj ekspluataj celoj) tute silentigis la monproblemon k preskaŭ malebligis ĝin enrigardi. Malgraŭ tio nun multaj proletoj, instigite de aliaj teorioj k de l' nunaj katastrofaj okazoj, sukcesis lumigi ĉi tiun ankoraŭ tre malluman kampon. La kapitalisma ekonomio kun siaj teruraj krizoj – inflacio k deflacio – plej bone elmontris al ni, ke la mono estas tre grava faktoro en la ekonomio.

La hodiaŭa ekonomio postulas nepre kiel helpilon iun ŝanĝilon (mono). Ĉar la labordivido, kiu nun estas tiom evoluigita, ne plu permesas, ke homoj ŝanĝu unu kun la alia siajn laborproduktojn. La mono staras inter varo k varo; ĝi sekve ankaŭ estas simpla varo aŭ ĝuste dirite *devus esti* varo, ĉar nun la varo iom post iom perdas je sia valoro, ekz. gazetoj jam tagon poste ne plu multe valoras, vestoj malmoderniĝas, nutroproduktoj putras, domoj kadukiĝas ktp, sed la mono ne havas tiun ekonomiaj econ, ĝi havas avantaĝon kontraŭ la varo. La mono en ordinaraj cirkonstancoj ĉiam restas samvalora, nur en tempoj de inflacio ĝi perdas je valoro; male en tempoj de deflacio kiel nun, la mono eĉ iĝas pli valora, ĉar la prezoj de l' varoj malaltiĝas. (Parenteze: mi ne komprenas, ke la germana socialdemokrata partio proponis „prezmalaltigon" por likvidi la krizon, kio signifas, ke la mono plivaloriĝas, la kapitalistoj havus pli da avantaĝo k la krizo per tio eĉ pligrandiĝus, ĉar la monposedantoj ne eldonas sian monon por krediti, sed atendas la plivaloriĝon).

Ĉar la nuna monsistemo bazita sur oro estas tia, ke monposedanto (kapitalisto) ĉiam havas avantaĝon, ke li povas diri: „Mi nur pruntas al vi la monon, se vi al mi redonas iom pli" (rentumon), tial ĝi havas malbonajn sekvojn por la ekonomio k ĉefe por la laboristoj. La hodiaŭa ekonomio

estas kreditekonomio, k pro tio ĝi estas dependa de la mono. La kapitalisto povas libere disponi pri sia mono pro ĝiaj avantaĝoj kontraŭ la varo, k li povas postuli tiom da rentumo, kiom al li eblas ricevi. La rentumo signifas grandan ŝarĝon por la produktado; la entreprenistoj estas devigataj aŭ altigi la prezojn de la produktoj, aŭ malaltigi la salajrojn de la laboristoj; ambaŭ estas malbono por la laboristoj, kiuj malrekte devas pagi la rentumon. La laboristoj tiel estas ege ekspluatataj, k la monposedanto iĝas la ĉefa kapitalisto – la ekspluatanto (kompreneble hodiaŭ tre ofte entreprenisto k monposedanto estas unu sama persono).

Granda parto de l' ekspluatado okazas do per la kapitalisma monsistemo. Krome la nuna sistemo pro sia ŝanceliĝo – inflacio k deflacio – havas gravan malbonan efikon al la tuta labormerkato: dum inflacio ĉiuj havas laboron, sed la salajroj malantaŭas la prezaltiĝojn, la laboristoj estas trompitaj; dum deflacio regas granda senlaboreco, la salajroj unue malaltiĝas, nur poste la prezoj, la laboristoj denove estas la trompitoj.

Ĉu ni proletoj ne almenaŭ en la afero de l'forigo de la kap. monsistemo unuiĝu, ĉu ni estas komunistoj, socialdemokratoj, anarkistoj aŭ individuistoj?

Kiel povas foriĝi la rentuma esenco en la mona problemo? Koncize dirite, jenajn proponojn faras *Silvio Gezel: La mono ne plu devas esti dependa de la oro.* La mono devas ricevi la saman econ kiel la varoj, nome ĝi devas *perdi je valoro* (eble monate unu aŭ duonan procenton). Tio signifas, ke la monposedanto ne plu povas reteni sian monon laŭvole k sensufere k agi tute libere, sed devas fordoni ĝin aŭ perdas iom da ĝi. Krome la monposedanto ne plu postulas rentumon, estante jam kontenta, se li perdas neniom. Per tio la rentuma problemo estus solvata.

Mi scias, ke ni per tio ne jam forigis la plenan ekspluatadon, ke nia kontraŭkapitalisma batalo pli multe postulas, sed almenaŭ ni per tio farus grandan paŝon antaŭen en nia liberigbatalo. Ne temas pri simpla reformo de l'kapitalisma sistemo, kiel ofte proletoj riproĉas; la forigo de l' ormona sistemo postulas vere revolucian agadon de l' tuta proletaro.

R. Pförtner (SAT-ano 6707).

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Ĉeĥoslovakio. Depost kelkaj jaroj ekzistas Lab. Ligo Esp-ista kun centro en Prago k redakcio de bulteno en Plzen. Fine de 1930 kelkaj K-doj serioze laborantaj sur la esp-a kampo projektis organizon paralele k en bonaj rilatoj kun la ekzistanta LEA laborantan sur la *germanlingva* teritorio de la respubliko. La unua kunveno (14. I. 31) decidis aranĝi kurson en la popoldomo de Aŭsig. Ĉi tiu okazis kun bona rezulto. Iom post iom estis elektata provizora komitato; kiel gazeto estis mendata „La Socialisto" (ankaŭ taŭga por komencantoj) k „S-ulo" (por jam progresintaj). En okt. 1931 komenciĝis dua kurso. Dum aprilo 1932 la statuto estis prezentata al kompetenta politika estraro k aprobata. (komence de junio). Per soc.demokrataj gazetoj ni alvokis la disajn lab. esp-istojn, kun rezulto, ke baldaŭ stariĝos lab. esp-ista ligo „Antaŭen" kun fiksita progresema programo. Kunvenoj ĉiun unuan merkredon de monato en Popoldomo Aŭsig. Por ke la Ligo bone prosperu, ĉiutendencaj K-doj sur la germanlingva teritorio ĝin aliĝu! Informcele (pri starigo de grupoj ktp) oni skribu al: „Verband d. Eisenbahner", Eduard Paul (redaktoro), Langegasse 38, *Aussig a. E.* (Ĉeĥosl.).

Francio. *Parizo.* En kunveno de la SAT-rondo, okazinta la 4-an de julio, diversaj SAT-aferoj estis priparolataj k protokolata la foresto de A. Soares, kiu, speciale alvokita por pravigi sian ridindan k sensencan klaĉadon kontraŭ la Direkcio de SAT k speciale kontraŭ K-do Lanti, ne kuraĝis veni por ĉeesti la kunsidon. Neniu voĉo aŭdiĝis por defendi la idekonfuzan klaĉulon. Estis elektata kiel peranto K-dino Ido Karmazine (13 236). Rilate al la organiza problemo regis unuanimeco por la konservado de la nuna strukturo de SAT.

Germanio. *Dortmund.* Gek-doj el kelkaj lokoj, ne apartenantaj al LEA aranĝis 3 renkontiĝojn: 1) en Gladbeck (20. 3.) kun 72 partopren. Parolis K-do Ziegler. Sekvis diskuto pri div. aferoj; 2) pentekoste en la erikejo de l' Haltern-a regiono. Pli ol 100 Gek-doj bicikle, trajne aŭ piede alvenis, eĉ de Herford k Bielefeld. Jam sabaton en la pajlejo regis vigla vivo. Dimanĉon matene okazis kurso por priparoli la div. instrumetodojn k interŝanĝi spertojn (ankaŭ pri gramatikaj malfaciloj). Posttagmeze ni propagandis por SAT k la Ŝtutg. kongreso. La novuloj tre ĝojis pri la aranĝo k estis surprizitaj aŭdi flue parolantaj en esp-o kelkajn infanojn. La duan festotagon pasigis ĉiu laŭplaĉe. Kolektiĝis ankaŭ rondoj por pridiskuti la situacion en SAT aŭ en politikaj, kulturaj organizoj ktp. Ĉiuj esprimis sian kontenton; 3) en Dorsten (29. 6.) kun ĉ. 35 partopren. Tiaj aranĝoj interligas, lingve perfektigas k politike klerigas. (Hilde Falkenherr, 13 563).

Svedio. *Höganäs.* La 22. 6. finiĝis kurso lerte gvidita de K-do Puff (Frankfurt). Pro tio ke la kursgvidantoj en nia distrikto ne sciis paroligi la lernantojn, ni bonŝance venigis kiel gvidanton la prezidanton de SEA. Li tre sukcese k efike gvidis kursojn en 5 lokoj, faris paroladojn k propagandis por la lab. esp.. movado. La 85 gelernantoj ĉiam memoros „onklon Karlo" k sentas dankemon pro lia laboro. (16 124). – La direktoro de *Gotlanda Fervoja Asocio* permesis laŭ la peto de Hurler, ke la esp-istoj inter la oficistoj de la Asocio portu dum la deĵoro sur la uniformo la verdan stelon. La direktoro plilongigis por du monatoj la permeson de duonpreza veturado al H. por povi efike propagandi. Espereble vizito de esp-istoj dumsomere al Gotlando ebligos al la fervojistaj esp-istoj ofte praktike esp-on. (Laŭ „Signalen").

La Memoron PLIFORTIGAS k PERFEKTIGAS laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio Prof. de mnemoniko **D. FAJNŜTEJN-VILNO,** Zawalna 15 (Pollando).

Dank' al mia metodo, bazita sur leĝoj de **psikologio, fiziologio, logiko k pedagogio, la MEMORO restariĝas** ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, **pliboniĝas** ĉe tiuj, kiuj havas malbonan k **perfektiĝas** ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe **foriĝas la DISTRECO k maldiligento, fortiĝas la VOLO k pliboniĝas ĉiuj psikaj kapabloj** ĉe personoj **ĉiuaĝaj.**

Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en esperanto.

Alvoko al ĉiuj Laboristaj Esp-Asocioj!

La propagando-komitato de ALLE (aŭstria LEA) antaŭ nelonge dissendis cirkuleron al ĉiuj LEA-oj, iniciatante starigon de tutmonda informservo por la laborista gazetaro. La tasko de tiu informservo devus esti, havigi al la laboristaj gazetoj en ĉiuj landoj pere de esp-o sciigojn pri gravaj okazaĵoj politikaj k ekonomiaj, eventuale kun mencio de la sinteno de la respektivaj diversaj lab. partioj. Tiucele en ĉiu LEA estu nomata aparta komitato aŭ persono(j), kiu(j) regule (ĉiusemajne aŭ laŭbezone) prizorgas la dissendon de tiaj sciigoj al la aliaj LEA-oj, kie la materialo estos tradukata en la koncernan nacian lingvon k enmetata en lab. gazetoj. La fakto, ke kelkloke jam ekzistas – kvankam nesisteme – tia provizado al la lab. gazetaro per eksterlandaj artikoloj, notoj ktp. ricevitaj per esp-korespondado, krome ke tiaj gazetoj, precipe en malgrandaj landoj, volonte akceptas k eĉ deziras la kunlaboradon de esp-istoj, permesas esperi, ke tiu entrepreno povos multe kontribui al la reputacio de nia movado ĉe partiaj, sindikataj ktp. instancoj. Jen eblo, meti esp-on *praktike* en la servon de la proletaro.

Ĉar tiu porgazetara informservo okazos interkonsente kun la Direkcio de SAT, ni nun ankaŭ per tio ripetas la alvokon k atendas baldaŭan respondon, eventuale kun precizaj proponoj ktp. En tiuj landoj, kie ankoraŭ ne ekzistas LEA, certe laborema(j) K-do(j) kunhelpos. Ĝis ni konos la opiniojn de la koncernaj faktoroj, ni senprokraste ekfunkciigos la gazetarservan aparaton. Oni do ĉie diskutu pri la projekto.

Kun proleta saluto
Propagando-Komitato de A.L.L.E.
Wien XXI., Angererstrasse 14.

Publikigante la ĉi supran tekston, ni opinias necese aldoni mallongan komenton. Estas dirite, ke tiu entrepreno okazas interkonsente kun la Dir. de SAT. Tio estas vera, sed necesas klarigi, ke ni konsentis, tial ke la iniciatintoj mem konfesis, ke tia aparato devus funkcii en la kadro de SAT. Cetere tiel estis ĝis antaŭ du jaroj, k ni elspezis por la tiutempa informservo, gvidata de K-do Besler, 400 markojn germ. ĉiujare. Pri la rezultoj la opinioj estis malsamaj; kelkiuj asertis, ke la energio k mono elspezitaj en tiu entrepreno estis preskaŭ senefikaj por nia esp-a afero. Ne temas nun diskuti pri tio; ni simple memorigas, ke ni ĉiam havis kiel principon ne malkuraĝigi, sed male helpi laŭpove la K-dojn, kiuj volas entrepreni ion novan k principe bonan.

Kelkaj jam kompostitaj artikoloj devis esti prokrastataj pro manko de loko en ĉi tiu n-o!

Pro konataj kaŭzoj SAT ne havas nun la financajn rimedojn por funkciigi informservon; ALLE ŝajnas posedi tiujn rimedojn; ni sekve volas konsideri ĝian iniciaton kiel nuran deziron sincere helpi al la lab. esp. movado.

Direkcio de SAT.

EKSTER NIA MOVADO

La V-a Internacia Kongreso de la Tutmonda Ligo por Seksa Reformo
okazos en Brno de 20-26. septembro. Inter la kongreslingvoj estas ankaŭ esperanto.

RADIO-PROGRAMO:

Radiosaluto al la SAT-Kongreso!
Sabaton, la 6-an de aŭgusto. je 20, 30 h. K-do Roux-Lyon salutos la SAT-kongresanojn per la radiostacio Lyon-la-Doua (ondolongo 466 m). Sciigu pri la aŭskulto al Esp. Lab. Grupo, 39, Cours Morand, *Lyon* (Francio).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Larissa Reissner: En la lando de Hindenburg. Ekrelo, Leipzig, 1931 Trad. *W. Kampfrad* k *W. Krej.* 78 pĝ. Form. 11,5×15,5. Prezo: 0.80 mk.g

Ĉio en tiu „vojaĝo tra la germana respubliko 1924" havas ankoraŭ aktualan signifon. La verkintino, frue mortinta, estis bona observanto k havis neordinaran raportistan talenton. Ofte oni sentas sin devigata, ĉe la legado, kapjese aŭ ridete aprobi tiun liberaniman revoluciecan kritikon pri la „naciaj sanktejoj" en Germanio, volvitan en tiom fluan, belan stilon. — La traduko estas fidela; nur sur pĝ. 66 mi notis eraron (*kvankam* anstataŭ *kvazaŭ*). „Uzino" (fabriko) estas malnecesa neologismo. *N. B.*

Maksim Gorkij: Kiel mi lernis. Trad. el la rusa *P. Tilin*. Ekrelo, Leipzig. 1931. — 23 pg. Form. 11×16. Prezo: 0.20 mk.g.

La fama verkisto rakontas en simpla maniero, kiel li ekŝatis librojn, k li deziras veki tiun ŝaton ankaŭ ĉe aliaj. Taksu la valoron de libro laŭ tio, ĉu ĝi estas verkita honeste, ame al homoj, dezirante al ili bonon! konsilas Gorki. Ĉu ortodoks-mensuloj cerbumos pri tiu konsilo?

La tradukinto devas lerni ĝuste apliki la difinitan artikolon (la).

F. Svjatenko: Nova k malnova uzinmajstro. Elrusigis *E. Ŝvedova*. Ekrelo, Leipzig, 1931. Form. 12×17. — 22 pĝ. Prezo 0.20 mk.g.

La fabriklaboristo Svjatenko verkis evidente laŭ partia ordono tiun ĉi broŝuron, per kiu li laŭdas sian novan majstron (postrevolucian) k kondamnas la malnovan (antaŭrevolucian). Jen la leciono: la unua, estrante la laboristojn, defendis la interesojn de l' kapitalista ŝtato, la dua, farante la samon, defendas la batalpoziciojn de l' kvinjarplano kun ĝiaj mirigaj laborritmoj. La neologismo *avantito* signifas supozeble „multe progresinto" (aŭ ĉu „karieristo"?).

Kooĵi Taŝiro: La unua suplementa Legolibro de Esperanto. Eldonejo Kiboŝa, Tokio. 1932. — 98 pĝ. Form. 15×21. Prezone indikita.

La libro konsistas el ekzercaj frazoj mallongaj, simplaj, ofte tial sufiĉe naivaj k infanecaj. Multaj desegnoj ilustras la mallongajn ĉapitrojn. La litertipoj estas grandaj, okulfrapaj. Tamen la tuta prezento estas sufiĉe kruda, primitiva k la ekstera aspekto ne tre plaĉa. La lingvaĵo estas zorge prilaborita.

iSK

Eperantlingva eldono n-o 15

Fric Grob: Gekamaradoj, rekonsciiĝu!
En tiu ĉi artikolo K-do Grob ne nur kritikas la blindan kredon pri nepra evoluo al socialismo kiel esencan kaŭzon por la nuna malforto de la laborista movado, sed li ankaŭ montras, ke respondeco pri la celo k forta volo garantias progreson al socialismo.

Teodor Hipeden: Socialpolitiko k socialismo.
K-do Hipeden principe pritraktas la sintenon de socialisto rilate la socialpolitikon. Per tio li donas firman gvidilon al ĉiu socialpolitike interesiĝanta socialisto.

Rose Geriŝ: Kien la virino apartenas politike?

Prezo: —.25 mk. g. por numero inkluzive afranko. — Mendu ĉe IVA-komandito, Berlin S 14, Inselstr. 8a.

GRAVA INFORMO!
Donaco al malriĉaj esperantistoj.

Iu grandanima samideanino, kiu bedaŭrinde malpermesis publikigi sian nomon, skribis: „Ne por montri bonan koron, sed por pruvi mian grandan ŝaton al via grandioza instrua k amuza gazeto *La Praktiko*, mi sendas al vi 200 dolarojn. Per tiu sumo mi pagas por 400 malriĉaj samideanoj la duonon de unu jarabono, tiel ke la alian duonon pagu la abonantoj mem. *La Praktiko* devas esti en la manoj de ĉiu esperantisto, kiu volas lerni k ridi."

Esprimante koran dankon al la nobla donacintino, la eldonejo de LA PRAKTIKO de sia flanko decidas simile pagi la duonon de la jara abono por 100 malriĉaj samideanoj. Sekve de tio entute 500 personoj povos ĝui la favoran abonon. (La abono por unu jaro kostas 1 dolaron.)

Ni alvokas nun tiujn gesamideanojn, kiuj suferas pro la ekonomia krizo k pro la falo de la naciaj valutoj, ke ili rapidu partopreni en ĉi tiu malofta favoro.

En interkonsento kun la donacintino ni aranĝas la disdonon de la donaco en jena plej facila k plej oportuna maniero:

Ĉiu persono, kiu deziras la favoran abonon, sendu al ni en simpla letero 10 (dek) tiajn poŝtmarkojn de sia propra lando, per kia li afrankas la eksterlandan leteron. La valoro de 10 tiaj poŝtmarkoj kune pli-malpli egalas al duona dolaro, do al duonjara abono. La alian duonon de la abonprezo ni pagos el la donacita sumo.

Kontraŭ la tiel pagita abono ni liveros LA PRAKTIKON dum la tuta jaro 1932 (do ni sendos ankaŭ la ĝis nun aperintajn numerojn de januaro). Mendoj ne konformaj al la supra maniero ne estos plenumataj.

Pluraj personoj povas sendi la abonon kune en unu letero, por ŝpari afrankon. Oni skribu sian nomon k adreson tre klare, laŭeble per skribmaŝino, aŭ imitante presitajn literojn. En la letero oni ne forgesu aldoni, kion ni faru kun la poŝtmarkoj, se la mendo alvenas tro malfrue, t.e. post la disdono de la 500 favorabonoj. Ĉu ni resendu la markojn, aŭ uzu ilin por duonjara ordinara abono?

Al tiuj personoj, kiuj ankoraŭ ne konas LA PRAKTIKON, ni sendas specimenan n-on senpage, je peto.

La leterojn kun la mendoj k poŝtmarkoj oni devas adresi al:

La eldonejo de LA PRAKTIKO,
Internacia Ĉe-Instituto de Esperanto
Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando.

NIA POŜTO

Harkovano. — Jes, regule. Dankon!

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

AŬSTRIO
K-do Franz Grohmann, Pischkerstr. 11, *Bruck a. M.*, kĉl, L, P, fotoj Resp. garantiata.

FRANCIO
Laborista Esp. Grupoj de Vizille k Grenoble dankegas la multn. Gek-dojn, kiuj resp. al ilia anonco, petas senkulpigon al nerespondeblaj pro troe ricevitaj let.

GERMANIO
K-do Helmut Nölting, Beurhausstr 56, *Dortmund*, kun eksterl. Gek-doj (ĉirkaŭ 20 j.), pri ĉ. temoj, L, PI.

„francisko moravec, *gross ottersleben* (bez. mgb.), oststr. 6, estas preta alilanden iri. instruas esp-on, gimnastikon, parolmovadĥorojn."

Kongresanoj! 3 sidlokoj en kongresaŭtobuso Stuttgart-„Ruhr"-regiono estas ankoraŭ vakaj. Prezo 7.50 mk.g. Skribu tuj al: W. Langhorst, Meinolphusstr. 14, *Bochum*.

NEDERLANDO
K-do A. R. H. Elenga, Weimansweg 21, *Rotterdam-Zuid*, kĉl, pri ĉ. temoj.

La pliperfektigita Heroldo

trovas la aplaŭdon de ĉiu abonanto. Ĉu vi jam vidis numeron el 1932? Se ne, petu senpagan specimenan numeron. Pli bone estas, se vi mendas provabonon por unu monato je la prezo de 0.80 gmk. aŭ 1.— svfk. Dum tuta monato vi havos okazon, prijuĝi la semajnan organon de la Esperanto-movado. Krome vi rajtas enpresi senpagan korespondanonceton. Post unu monato vi fariĝos daŭra abonanto! Samtempe postulu katalogojn pri esperanto-literaturo.

Mendu ĉe la Administracio de „Heroldo de Esperanto", *Köln*, Brüsselerstr.94, Germ.

ENHAVO

	pâĝo
Pri la organizo problemo	217—220
Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT	220—224
La lakto-centrejo por Ŝtutgart	222
La klasbatalo tra la mondo	223
Aldona teksto	224—225
Proponoj al la XII-a Kongreso de SAT	225—226
Mi volas scii	226
Diskutejo	226—227
Alvoko al ĉiuj laboristaj Esp.-Asocioj	227

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)